

中國報道


EL POPOLA

ĈINIO





Yungang-ŝtonkavernaro ĉe la piedo de Wuzhou-montaro okcidente de Datong, Shanxi-provinco, estis farita antaŭ 1 500 jaroj. La ŝtonkavernaro longas unu kilometron de oriente okcidenten, kun 53 grandaj kaj malgrandaj kavernoj kaj pli ol 51 000 ŝtonaj statuoj ene. La plej



granda statuo altas 17 metrojn kaj la plej malgranda nur 2 centimetrojn. La ŝtonkavernaro estas konata kiel monda trezoro de arto. La foto montras parton de la ŝtonkavernaro.



INTER NI

EPĈ devas esti vizitkarto de Ĉinio

Mi timas, ke via revuo iĝos malpli diversspeca, nun mi do provos laŭeble mallonge skribi, kia laŭ mi devus esti "El Popola Ĉinio".

Laŭ la titolo de via revuo ĝi devas esti ĉina. Tio estas tre grava, ĉar multaj revuoj en Esperanto ne prezentas kulturon kaj vivon de sia nacio, sed plejparte informas pri E-movado. Ĝis nun via revuo estas pli ĉina ol Esperanta. Sed bonvolu ne forgesi, ke E-movado kreis sian propran kulturon. La kulturo en via revuo ne povas esti pli forta ol la ĉina.

Mi lernas Esperanton por ekoni alilandajn sociojn, kulturojn, historiojn kaj vidpunktojn. Do, "El Popola Ĉinio" devas esti vizitkarto de Ĉinio anstataŭ tiu de ĉina aŭ monda E-movado. Kompreneble, ankaŭ informoj pri E-movado estas bezonataj.

Via revuo estas adresita al diversaj esperantistoj en diversaj landoj kaj viaj legantoj estas diversnivele edukitaj, tial vi devas verki diversnivelajn artikolojn. Viaj legantoj estas plejparte eksterlandanoj. Ili plimalpli konas Ĉinion. Sed viaj laborantoj plej bone konas Ĉinion kaj plej bone scias, kion vi devas raporti al eksterlandanoj.

Oni nur povas revii, ke via revuo iĝu semajnrevuo aŭ krom "El Popola Ĉinio" aperu novaj esperantlingvaj revuoj, ekz. "Ĉina Medicino", "Ĉina Sporto" aŭ "Antikva Ĉina Historio".

KRZYSZTOF ZERO
(Pollando)

ENHAVO

30 **Pri la loĝantaro kaj naskolimigo de Ĉinio (1)**

26 Vojo al bonstato en la ĉina kamparo

22 **Ĉina-usona kompanio kun aparta administra metodo**

46 **Tetrinkejo Lao She**

40 **EL ĈINAJ GAZETOJ**

10 **Nuklea tekniko en agrikulturo de Ĉinio**

38 Nia progreso ne hazarda

20 **MEDICINA KONSULTEJO:**

Feliĉo por hemiplegiuloj

49 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**

Ĝardena korto de uĝuroj

37 Orfadenaj jujubetoj de Leling

6 **VOJAĜO EN TIBETO (V):**

Gaja Xuedun-festo

28 **TRA LA MONDO:**

Lignoskulpturo de Tanzanio

44 **AMUZOJ**

42 **KURANTAJ AĜEROJ**

18 **ESP-NOVAĴOJ**

14 Esperanto-movado de Hunan

16 **HOMOJ NEFORGESEBLAJ (3):**

Elpin

41 La Granda Muro

19 **SUR NIA LIBROBRETO:**

Valora didaktika legolibro

5 **POR KOMENCANTOJ:**

Novaj rakontoj pri lupoj

4 **INTER NI**

44 **KORESPONDI DEZIRAS**

17 Esperanto estas la lingvo por mi (kanto)

25 **MODERNAJ-VESTOJ**

Printempaj vestoj

SUR LA KOVRILO:

Inter floroj

Foto de GAO MINGYI

SUR LA DORSKOVRILO:

Jinan-a Petrolrafinejo sub la Ĉina

Petrol-kemia Kompanio

2 Yungang-ŝtonkavernaro

Foto de YAN JIN

4 Ĉe lago

Foto de LU REN

34 Gaja mondo

Teksto kaj fotoj de LING YOUJUAN

32 Amikeco inter ni

Fotoj de HAI FENG

21 Senvaloraĵoj utiligeblaj

Fotoj de LIU SIGONG

21 Tradicia festo de li-oj

Teksto kaj fotoj de MAO JIANJUN


LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Jining-gubernio (p. 26)

2. Leling-gubernio (p. 37)

3. Yining (p. 49)

4. Changsha (p. 14)



VOJAGO EN TIBETO (V)


GAJA



Portreto de Tangdongjieber

Presentado de tibeta opero en Zhebang-templo

Foto de YU XIANGJUN




XUEDUN-FESTO

Teksto kaj fotoj de LI QIANG



Norpu Linka en festo Foto de YU XIANGJUN



Alilandaj turistoj ĝuas prezentadon.

Bonaŭguro en tradicia festo



DUM mia vojaĝo en Lhasa mi havis feliĉon partopreni la tradicion tibetan Xuedun-feston, kiu daŭras de la 30-a de la sesa monato ĝis la 2-a de la sepa monato laŭ la tibeta kalendaro. En la tibeta lingvo Xuedun signifas "trinki jahurton". Poste oni nomas ĝin ankaŭ Festivalo de Tibetaj Dramoj, ĉar ludi tibetajn dramojn estas ĉefa aktivado en la festotagoj.

Oni povas diri, ke Xuedun-festo, same kiel la novjara tago de Tibeto, estas la plej solena kaj grava por la tibetanoj. Tiam ankaŭ la registaraj oficistoj ĝuas 3-tagajn feriojn. Por mi estas neforgesebla la vizito en la festaj tagoj.

SPEKTI TIBETAJN DRAMOJN EN ZHEBANG-TEMPLO

En la unua tago de Xuedun-festo mi spektis tibetajn dramojn

en Zhebang-templo nordokcidente de Lhasa je 5 km.

La templo, konstruita en 1416, estas la plej granda budhisma templo en Tibeto. En ĝia plej prospera periodo, tie vivis pli ol 7 700 bonzoj. Laŭ tradicio en la unua tago de Xuedun-festo oni prezentas tie tibetajn teatraĵojn por bonzoj.

Antaŭ la 17-a jarcento en Xuedun-festo oni faris ekskluzive religiajn aktivadojn. Laŭ reguloj de la tibeta budhismo en somero al la bonzoj de Zhebang-templo estis malpermesite eltempliĝi. Nur en la fastoĉesigaj tagoj ili eltempliĝas almozpeti. Tiam loĝantoj de Lhasa donis al ili jahurton. Krom tio la bonzoj laŭeble amuzis sin. Tiele naskiĝis Xuedun-festo.

Poste la simplajn amuzaĵojn anstataŭis festivalo de tibetaj dramoj, kiu iris en Zhebang-templo, kaj oni nomis la festivalon Xuedun-festo. Kvankam poste Xuedun-festo estis celebrata an-

kaŭ en la ĝardeno Norpu Linka, tamen oni ĉiam en Zhebang-templo prezentas tibetajn dramojn en la unua tago de la festo.

Mi atingis la templon longe antaŭ la prezentado, tiam la teatro jam estis plene okupita de bonzoj kaj alilokaj popolanoj. Ĉirkaŭ la scenejo troviĝas portikoj, kiuj servas kiel sidlokoj de la rigardantoj. La teatro estis en korto, super kiu estas granda blanka kanvaso, tial la loko estas hela kaj ŝirmata de rekta priradiado de la suno.

Sur tablo meze de la teatro estis rektangula ligna skatolo kun tritiko kaj milio ene. Sur ili vidiĝas buteraj floroj, tritikaj spikoj kaj freŝaj floroj. Ili simbolas bondezirojn de la tibetanoj, t.e. favoran veteron kaj riĉan rikolton. Post la tablo staras stango, sur kiu pendas portreto de Tangdongjiebu (1385-1465), kreinto de la tibetaj dramoj.

En la prezentado sursceniĝis

Budhoportreto montrata en Xuedun-festo



unu post alia la diverslokaj grupoj de tibetaj dramoj. Ĉiu grupo adorkliniĝis antaŭ la portreto de Tangdongjebu kaj petis lian benon de la prezentado. Ŝajnis al mi, ke enhance la teatraĵoj estas similaj, ĉar mi ne komprenas la tibetan lingvon. La alivestado estis simpla. Kun masko blua, nigra aŭ viola la aktoroj dancis per grandaj movoj. La aktorinoj en belaj vestoj kaj kun plum-simila ĉapo dancis gracie. La tibetaj teatraĵoj estis luditaj akompanate de tamburoj, gongoj kaj aliaj simplaj instrumentoj, kies takto ŝanĝiĝis laŭ la disvolviĝo de intrigoj. La mirinda prezentado foje refoje elvokis aplaŭdadon de la rigardantoj.

KULTO DE BUDHOPORTRETO

Kulto de la granda budhoportreto estas alia grava enhavo de Xuedun-festo.

Laŭ regulo, apenaŭ la suno levigis, oni devas elmeti la grandan budhoportreton konservitan en Zhebang-templo sur la glaciso destinita por la granda budhoportreto apud la templo, por ke la pilgrimantoj respektplene rigardu ĝin sub la ĵus leviĝinta suno. Tiu ceremonio okazas unufoje ĉiujare, tial partopreni tiun aktivadon estas rare por alilokanoj.

Tamen, la vetero ne estis favora. Pluvo ekfalas en la pasinta nokto kaj ne ĉesis matene. Mi venis en la templon en mallumo, malgraŭ pluvo. Antaŭ la 6-a ĉe la montpiedo jam viciĝis kiel longa vico la pilgrimantoj, kiuj volis supreniri la monton. Mi trovis sidlokon sur la tegmento de iu halo proksime de la glaciso, tie mi povis klare vidi la budhoportreton. Je la 8-a mi rimarkis, ke sur la montodeklivo ĉe la templo amasiĝis homoj, iuj sidis sub ombrelo, kaj plejparto de ili silente atendis malgraŭ la pluvo, kio plene montris ilian piecon.

Nemalmultaj budhistoj bruligis artemiziajn foliojn, kiujn ili alportis. La fumo leviĝis de sur la montodeklivo, tamen la pluveto daŭre

falas kiel tra kribrilo. Mi pensis, ke eble la ceremonio estos prokrastita. Neatendite, je la 10-a, grupo da lamaoj venis al la ebenaĵo antaŭ la glaciso blovante kaj tamburante, tenante rondan flavan ombrelegon. Iu prestiĝa bonzo komencis reciti sutron per laŭta voĉo.

Estis mirinde, ke post ĉ. 30 minutoj la pluvo ĉesis kaj la suno elrampis el la nuboj. Sunlumoj lumigis la montodeklivon kaj la homamasoj ekhurais.

Komenciĝis la ceremonio. Lamaoj sternis la grandan budhoportreton sur la altaĵo kaj volvis la flavan silkaĵon ŝirmintan la portreton. La budhistoj ekrampis surtere kaj adoris ĝin, multaj pilgrimantoj oferis blankan silkan rubandon antaŭ la budhoportreto kaj la plimulto, vizaĝe al la portreto kun kunmetitaj manplatoj, petis la benon de Budho murmurante. Rigardante la piulojn atendintajn 4-5 horojn en la pluvo, mi sincere esperis, ke realiĝos ilia deziro.

Pasis malpli ol unu horo, lamaoj reprenis la portreton kaj oni malsupreniris de la monto kaj mi aŭte revenis al la urbo. Mi ne atendis, ke tiam denove nubigis la ĉielo, la suno refoje kaŝis sin kaj ne plu reaperis dum la tuta tago. Mi pensis en mi, ke la kaprica vetero sendube vualis la koron de multaj budhistoj per mistera koloro.

ĜOJOPLENA NORPU LINKA

En la tria tago de Xuedun-festo mi kaj miaj kolegoj iris al Norpu Linka por pikniko. Niaj mastroj, tibetaj oficistoj de la loka registaro, jam elektis por ni lokon en la arbareto. Jen nia ĉefstabejo.

Profitante de la liberaj horoj antaŭ la pikniko, mi promenis en la arbareto. Antaŭ 200 jaroj Norpu Linka estis dezerta loko kun densaj herboj, kie moviĝis sole sovaĝaj kaproj. Poste, tie oni konstruis palacon, kie loĝis Dalai-lamao en somero. Iom post iom la dezerta loko transformiĝis en 360 000-kvadratmetran ĝardenon

kun pompaj konstruaĵoj, prosperaj floroj kaj arboj.

Antaŭe la ĝardeno estis apartigita per altaj muroj kaj dika pordo disde la ordinaraj popoloj. Nur post la paca liberiĝo de Tibeto oni povas libere viziti ĝin. La allogaj freskoj en la palaco de Norpu Linka kun la klaraj artaj trajtoj estis verkitaj en pentrstiloj de freskoj en diversaj temploj kaj palacoj de Tibeto.

En la festaj tagoj Norpu Linka fariĝis pli vivoplena. Tuj interne de la enirejo vidiĝis ŝtataj kaj privataj butikoj. Tie oni vendis kaj interŝanĝis diversajn varojn. Proksime de ili ofertas manĝaĵovendistoj.

Pluen irinte de tie, mi atingis la lokon destinitan por ludi tibetajn dramojn. La tiea teatro estas sur ebena loko, ĉirkaŭ ĝi sidis rigardantoj venintaj pli frue kaj la aliaj rigardis starante. La spektaklo okazis same kiel en Zhebang-templo. Inter la rigardantoj ĉi tie vidiĝis ankaŭ hanoj el la landinterno kaj alilandaj turistoj krom tibetanoj. Mi trovis, ke la tibetaj spektatoroj en festaj vestoj kaj kun luksaj kap-ornamaĵoj ofte turnis siajn rigardojn al tiuj fremduloj.

En aliaj lokoj de Norpu Linka vidiĝis multaj familiaj tendoj. Oni, en festaj vestoj, portempe loĝis ĉi tie, gemaljunuloj babilis trinkante teon, gejunuloj kantis ludante muzikilon, kaj infanoj petolis sur tapiŝo aŭ herbejo kaj magnetofono dissendis gajan muzikon. Ĉie regis gaja festa atmosfero.

Tagmeze mi revenis en nian ĉefstabejon. Tiam la manĝaĵoj estis jam pretigitaj de niaj tibetaj mastroj. Ni manĝis babilante. Ĉe la manĝofino ni ĉiuj trinkis bovlon da jahurto. Post la manĝo, ni improvizis programerojn. La tibetaj oficistoj lerte kantis kaj dancis sur la herbejo. Ili prezentis programe- rojn unu post alia. Ĉe la sunsubiro ni kaj niaj mastroj kolektis la objektojn kaj forlasis la ĝojoplenan Norpu Linka. ■

JIN SHOUMING:


Nuklea tekniko en agrikulturo de Ĉinio

Esploro pri maiza asimilo de fosfora sterko per ^{32}P -spurdonanto






Provkulturata rizo, kies semo estas traktita per nuklea radiado



Nova specio de krizantemo elkreskinta post nuklea radiado

Observado de la ultrastrukturo de biologia specimeno



Rizo (meze), kies semo ricevis nuklean radiadon



EN la agrikultura produktado de Ĉinio la nuklea tekniko estas aplikata pli kaj pli vaste. La mistera nuklea agronomio nun estas konata de pli kaj pli multe da homoj.

Jam pasis pli ol 30 jaroj de post kiam la nuklea agronomio enkondukigis en nian landon. Jam en la projekto de la 12-jara scienc-teknika disvolviĝo farita en 1956 legiĝis artikolo pri paca utiligo de atomenergio. De post 1957 fondiĝis serio da institutoj de nuklea agronomio kaj en Ĉinio iom post iom formiĝis nukle-agronomiaj retoj de scienca esploro kaj akademia interŝanĝo.

Agronomio estas la bazo de la nacia ekonomio de Ĉinio. Sciencoj kaj teknikoj ludas gravan rolon en la disvolviĝo de agrikulturo. En la pasintaj pli ol 30 jaroj sur la vasta kampo de agrikulturo la nuklea tekniko kaj agronomio faris mirindan meriton en la kunlaboro, influante unu la alian.


Nun nuklea radiado estas ideala helpanto de la semo-bredistoj. Pli-bonigo de semoj, plantoj kaj diversaj organoj per radiado povas kaŭzi diversajn genetikajn variadojn. La bredistoj zorgeme selektis kaj bredis la mutaciulojn kaj elkulturis novajn speciojn. La rizo "Yuanfengzao", bredata per radiado, ma-


turiĝas pli frue je 45 tagoj ol la originala specio kaj pliproduktiĝas je 10% ol la rizo nun ĝenerale kulturata. Nun ĝi kreskas sur miliono da hektaroj da kampoj en la suda parto de Ĉinio. La kotono "Lumian n-ro 1" bredata per radiado kaj hibridigo estas kompakta en konsisto, forta en buloformiĝo kaj donas pli multe da floroj antaŭ prujnado. Ĝi senprecedence abunde rikoltiĝis sur 600 000 hektaroj da kampoj en Shandong-provinco. La sojfaboj "Tiefeng n-ro 18" bredataj per radiado havas altan produktokvanton kaj donas multe da oleo. Nun ili kreskas sur 300 000 hektaroj da kampoj. La supre menciitaj specioj gajnis la unuagradan premion de la ŝtata invento. Ĝis la fino de la 80-aj jaroj Ĉinio bredis per radiado aŭ tiu tekniko kaj aliaj metodoj en kombino 325 bonrasajn speciojn de 29 plantoj, kiuj kreskas sur 9.3 milionoj da hektaroj da kampoj. Nun Ĉinio okupas la unuan lokon en la mondo en aplikado de radiado tiuflanke. Ĉiujare ĝi pliproduktas 3.7-4 miliardojn da kilogramoj da greno, 150-200 milionojn da kilogramoj da kotono kaj 50-75 milionojn da kilogramoj da oledonaj plantoj. Krome Ĉinio bredis ankaŭ multajn speciojn de fruktoj, legomoj kaj floroj. Tiel la nuklea tekniko ludas gravan rolon por pli-bonigi la popolan vivon.

La etdoza radiado povas stimuli la kreskon de la plantoj. Ekz. la neŭtrona radiado povas pliigi la produktokvanton de salikokoj je 10%. La radiado de ovoj de silkraŭpoj kaj kverkaj silkraŭpoj per rapidaj neŭtronoj aŭ gamaradioj povas levi la produktokvanton de kokonoj je 20%. Ĝenerale, la radiado okazas en la produktejo. Tiu simpla tekniko multe profitigas la entreprenantojn.

Radiado povas steriligi la insektojn. La priradiitaj insektoj povas pariĝi same kiel ordinaraj insektoj, tamen ne donas idojn. La de ili ellasitaj ovoj plejparte ne faras eloviĝon. La malgrandnombraj eloviĝintaj larvoj baldaŭ mortas, kaj eĉ se ili plenkreskas, ili ne donas idojn. Tial ellaso de granda kvanto da priradiitaj fiinsektoj en iu ajn loko povas malpliigi kaj eĉ neniiigi ilin. Ĉinoj faris esploron pri neniiigo de fiinsektoj per radiado jam 30 jarojn kaj akiris grandajn sukcesojn en radia prevento kaj neniiigo de fiinsektoj ostrinoj (*Ostrinia nubilalis*) kaj tetradaĵoj (*Tetradacus citri*). En 33-hektara oranĝogardeno en Guizhou-provinco oni faris eksperimenton ellasi priradiitajn tetradaĵojn kaj la rezulto montris, ke la damaĝitaj fruktoj malleviĝis de 5-8% al 0.005%. Per tiu metodo oni povas eviti polucion pro insekticidoj.

Loko por semo-bredado kaj genetica esploro per nuklea radiado





Terpomoj en telero traktitaj per nuklea radiado kaj konserveblaj pli longe

Kompreneble la altdoza priradiado povas rekte mortigi fiinsektojn kaj bakteriojn. Tiu metodo estas aplikata nun en traktado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Krome, la radiado povas prokrasti la burĝonadon de terpomo, cepo kaj ajlo, plilongigi la floradon de viando kaj fruktoj, akceli la maturiĝon de rizvino, preventi ŝimadon de sekaj fruktoj kaj cigaredoj kaj plilongigi la floradon de envazaj floroj. Ĉinio havas dekojn da grandaj kaj mezgrandaj radiaj instalaĵoj, kiuj ĉiujare priradias proksimume 10 000 tunojn da objektoj. Nun la priradiado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj ilia konservado fariĝis pli kaj pli praktikaj. Surbaze de la eksperimento per bestoj la higienaj departementoj de nia lando donis 35 specojn da priradiitaj manĝaĵoj al 382 homoj. La rezulto montras, ke la manĝaĵoj estas puraj kaj tute sendanĝeraj.

“Spurdonaj atomoj” havas gravan funkcion. Fari markojn sur insekticidoj kaj sterkoj per radioaktiva aŭ stabila izotopoj kaj ekzameni ilin por malkovri lian agadon en la plantoj kaj en la medio. Per esploro pri la insekticida restaĵo Ĉinio havigis al si sciencajn bazojn por produktado kaj sekura uzo de novaj insekticidoj kaj ellaborado de koncernaj reguloj. En la provincoj Hubei kaj Sichuan oni aldonis al

rizkampo ureon kaj amonian karbonaton kiel bazan sterkon, kio levis la utiligan procenton je 10-30%. Tiu metodo nun estas aplikata sur miliono da hektaroj da kampoj kaj multe levis la produktokvanton de rizo. La esploro pri la efiko kaj aplikado de iu kombinita sterko donis la plej bonan recepton al la entreprenantoj kaj helpas la aplikantojn en difino de efika uzado por akiri deziratan profiton. Estas ja tre grava la esploro pri la transportaj reguloj de fotosintezitaj plantoj kaj la formiĝo de ilia produktokvanto, pri la funkcio de mikroelementoj en la vegetalaj kaj bestaj nutroj per la tekniko de spurdonaj atomoj.

Nuklea tekniko estas efika por helpi scienc-esploristojn en plenumo de taskoj malfacile plenumebaj per aliaj metodoj. Ekz. per neŭtrona aktiva analizo oni povas analizi kelkajn kaj eĉ kelkdekajn elementojn rapide, precize, sendetruaj kaj samtempe. Per tiu tekniko oni povas precize determini la kvanton de mikroelementoj de herbejo kaj tiun de malutilaj elementoj en la manĝaĵoj kaj medio kaj liveri fidindajn donitaĵojn por direkti la produktadon kaj protekti la medion. Per radia imun-analizo oni povas koni la progesteronan entenon en la bovlakto produktita de la bovinoj post ensemado kaj ilian gravediĝon en la frua tempo.

Trovinte, ke la bovino ne gravediĝis, oni povas denove gravedigi ĝin por pliigi la kvanton de la lakto. La prognoza metodo estas simpla. En bovinejo, kie mankas kondiĉoj por fari la analizon, oni povas gutigi la laktan specimenon sur lakmusan paperon kaj poŝte sendi ĝin al la analiza stacio. Tiu metodo nun estas aplikata en produktado.

La mikrosolidfaza radia imun-analizo estas simpla kaj preciza en la fruperioda prognozo pri la virusa malsano de rizo. Spektrometro, masospektrografo, elektronmikroskopo, radioaŭtografo, likvotrembrila mezurado kaj diversaj aparatoj regataj per komputiloj inventitaj en la lastaj jaroj donis grandan helpon al esplorado de la natura mistero.

Nun en la gena inĝenierio kaj esploro pri bionitrogena fiksado jam vidiĝis transiro de nuklea tekniko al biotekniko kaj aliaj altaj sciencoj kaj teknikoj. En Ĉinio oni pliigas la nitrogenan fiksadon en la radika zono per NH-nitrogen-tolerantaj kaj fiksantaj bakterioj. Per tiu tekniko oni levis la hektaran riz-produktokvanton je 375-450 kilogramoj. Nun tiu tekniko estas aplikata sur pli kaj pli multe da rizkampoj.

Aplikante nuklean teknikon, sciencistoj kaj teknikistoj ne forgesis la malutilon de radionukleino al agrikulturo kaj medio. Por protekti la homan sanon kaj ekologian medion, la ĉina registaro faris enketadon kaj taksadon pri radiado de akvo, grundo, ĉefaj agrikulturaj plantoj kaj diversaj manĝaĵoj en regionoj blovataj de la vento de nukleaj eksperimentejoj, regionoj proksimaj al nukleaj instalaĵoj kaj nukleaj elektrejoj, kaj tiel ĝi metis solidan bazon por ellabori sekurajn metodojn.

Ĉio ĉi tio montras, ke en Ĉinio la nuklea tekniko ne portas al la loĝantoj detruon nek teruron. Ĝi donas grandan movforton al la konstruado. La nuklea agronomio nun jam fariĝis nova scienco vivoplena kaj prospere disvolviĝanta. Ĝi alportas al la homoj piii feliĉan vivon. ■

Esperanto-movado de Hunan

LASTATEMPE mi vizitis Hunan-provincon de suda Ĉinio kune kun kelkaj pekinaj raportistoj. Kiel esperantistino, kompreneble mi aparte interesiĝis pri ĝia Esperanto-movado.

Antaŭ longe mi jam informiĝis, ke Hunan estas unu el la regionoj de Ĉinio, en kiujn pli frue enkondukigis Esperanto. Laŭ historia materialo, en la komenco de la kuranta jarcento oni instruis E-on en Changsha, ĉefurbo de la provinco. Ĵurnalistoj Huang Huashou fondis en 1913 la Changsha-an Esperantan

Kolegion, kie li semis la unuajn verdajn semojn. En la 20-aj jaroj la Esperanto-movado de Changsha vigliĝis tagon post tago. Tie funkciis Esperanto-kursoj, multe da progresemaj junuloj partoprenis en la lernado. Wang Luyan, kiu lernis Esperanton de la rusa blinda poeto V. Eroŝenko en la Pekina Universitato, instruis Esperanton en la Unua Normala Lernejo de Hunan. En 1925 oficiale fondiĝis la Changsha-a Esperanto-Societo. Meze de la 30-aj jaroj la Changsha-a Radiostacio funkciigis Esperanto-kurson. Post eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilto iuj esp-istoj de Jiangsu-provinco kiel

Zensto kaj Hanglio fuĝis en Changsha. Dank' al ilia kunlaboro kun la lokaj esperantistoj fondiĝis la Hunan-a Esperanto-Asocio. Ili instruis E-on kaj fervore propagandis por rezisto kontraŭ Japanio sub la slogano "per Esperanto por la liberigo de Ĉinio". Lokaj esp-istoj faris internacian propagandon en E-o pere de la provinca radiostacio, disaŭdigis la artikolojn "Ĉinio Nekonkerebla" kaj "Letero al la Brita Popolo", verkitaĵojn de s-ino Song Qingling, edzino de la antaŭiranto de la ĉina demokratia revolucio Dr. Sun Yatsen, kaj raportojn malkovrantajn la agrosan krimon de la japanaj invadantoj. Kiam Changsha estis okupita de la malamikoj, Zensto, Hanglio, Ĉen Tan k.a. propagandis Esperanton en iuj mezgrandaj kaj malgrandaj urboj sude kaj okcidente de la provinco.

Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis Changsha kaj intervidiĝis kun pluraj lokaj esperantistoj kaj Spin, honora prezidanto de la Hunan-a E-Asocio. Li lernis nian lingvon en la nordĉinia kontraŭjapana bazloko en la 30-aj jaroj. En la pli-ol-dekjara militista vivo

ĉiam akompanis lin E-aj lernolibroj kaj vortaro. En paŭzoj inter bataloj li ofte legis ilin. Li estas tre fervora por E-o. Nin multe ĝojigis la revidiĝo en Changsha. Li diris, ke kun la reformado kaj pordmalfermo en la pasintaj dek jaroj la Hunan-a E-movado havis novan progreson. En la provinco ĉ. tri-kvar mil homoj lernas E-on. En

Inaŭguro de Esperanta kurso por elementlernejaj instruistoj de Shaoyang



1980 la Hunan-a E-Asocio fondiĝis. Poste en ok ĉefaj urboj, kiaj Changsha, Hengyang, Yueyang kaj Huaihua, sinsekve fondiĝis E-asocioj.

La lokaj e-istoj estas fidelaj kaj fervoraj al E-o, tio profunde impresis min. Sekvante la ekzemplon de veteranaj e-istoj, ili aktive propagandas kaj disvastigas la lingvon. Por ke pli da homoj lernu nian lingvon, la Hunan-a E-Asocio kaj Hunan-a Televizio kune funkciigis E-kurson lastjare. Por kolekti historiajn materialojn pri la ĉina E-movado kaj akceli la studon de la historio de la landa E-movado, ili iniciatis la gazeton "Veterana Esperantisto" kaj faris korespondan instruadon en la gazeto kunlabore kun la Pekina Veterana Esperantisto-Asocio. Por kuraĝigi ilin, provincestro Xiong Qingquan speciale skribis por la gazeto: "Disvastigu E-on, oftigu internacian interŝanĝon kaj kontribuon al la paco kaj disvolviĝo de la mondo".

En Zhuzhou, Feng Yansheng, kiu lernis en la kurso de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto, venis al la hotelo por viziti min.

Ŝi diris, ke subtenate de la eduka kaj scienca departementoj de la urbo, ŝi funkciigis tri E-kursojn. Respondeculo de la Esperanto-Asocio de la Lianyuan-a Ŝtala Fabriko konigis al mi, ke kunlabore kun la televida E-kurso funkciigata de la Hunan-a Televizio, la fabriko propagandis E-on pere de sia televidstacio kaj radiostacio, pendigis ĉe la enirejo portreton de Zamenhof kaj skribon kun verda stelo kaj faris konsultiĝon pri E-aj scioj duonmonaton.

Yang Kaiyuan, eksdirektoro de la Changsha-a Filio de la Ĉina Internacia Turisma Servo, ĉiam klopodis por apliki E-on, de kiam li eklernis ĝin en 1980. Pere de E-o li amikiĝis kun multaj eksterlandanoj kaj dufoje organizis turismajn grupojn el eŭropaj kaj japanaj e-istoj. Poste li funkciigis E-kurson en la Turisma Fakultato de la Hunan-a Politekniko por kulturaj esperantistoj de turisma servo.

Pli kortuŝa estas sinoferemo de fervoraj e-istoj. Vicprezidanto de la Changsha-a Esperanto-Asocio Jiang Zuyue, ekde 1980 sin dediĉis al disvastigo de E-o.


Li senpage instruis la lingvon, entuziasme akceptis alilokajn samideanojn kaj donis al ili lecionon. Fojfoje li senpage liveris al ili loĝejon kaj manĝon. Li organizis la Hunan-an Esperantan Studrondon kaj senpage donis lecionojn al la komencantoj de la tuta provinco. Li korektis iliajn ekzercojn, respondis al ili diversajn demandojn kaj donis al ili informojn pri E-movado de diversaj lokoj. Por korespondi kun tiuj nekonataj junuloj li ofte skribis ĝis profunda nokto. Li iniciatis la mimeografitan gazeton "Organo de Changsha-a Esperanto-Asocio", kaj tiu estas bona loko de junaj e-istoj por interŝanĝi lernosperton kaj publikigi siajn verkaĵojn.

Zhang Jianzhong, dekanano de la Fremdlingva Fakultato de la Huaihua-a Normala Kolegio kaj honora prezidanto de la Huaihua-a E-Asocio, funkciigis senpagajn E-kursojn kun la kolegio kiel la bazo. Li estis tre okupita pri sia profesia laboro, tamen li ankoraŭ persone donis E-lecionojn. Plurfoje li iris al hejmo de lernanto por doni helpon. Iu infangardenistino ne povis iri al leciono pro paralizo je la malsupraj membroj, sed deziris lerni E-on. Zhang iradis al ŝia hejmo por doni al ŝi lecionojn.

Ankaŭ la 72-jara Liu Liduan, prezidanto de la Xiangtan-a E-Asocio, estas e-isto kun tia virto. Li diris al mi: "E-movado estas nobla afero. E-istoj devas esti sindonemaj, sed ne profitemaj." Dum multaj jaroj li funkciigis E-kursojn postulante malaltan pagon. Dekalkulinte lupagon por klasĉambro, li donis la tutan restaĵon al la asocio je ĝia dispono.

Kvankam mi ne faris pli profundan enketon pri la Hunan-a E-movado, tamen mi jam vidis el la supraj faktoj inspiran perspektivon de la E-movado de la provinco. ■

Spin (maldekstre) instruas Esperantan kanton al sia filino.



Elpin (Usan)

de Chen Yuan

EN 1935-1936, kiam mi studis en la dua klaso de la industria kolegio, en la trian klason de la literatura kolegio venis nova korea studento. Li estis esperantisto Elpin veninta de Pekino al Ŝanhajo kaj de Ŝanhajo al Kantono. Inter la nordaj esperantistoj li nomis sin Elpin, sed inter la junaj kantonaj esperantistoj — Usan. Jam de la unua renkontiĝo ni interparolis nur en Esperanto kaj neniam parolis la ĉinan aŭ anglan lingvon (en la fakultato de la angla lingvo, en kiu li studis, studentoj ofte interparolis angle). Tio estis bona ŝanco por mi ekzerci la langon kaj bona ŝanco disvastigi Esperanton.

Elpin estis kvieta, entuziasma kaj multescia. Li amis poemojn kaj verkis belajn versojn. Sed kiam li kantis Esperantan kanton, lia kantado deviis de la tono ekde la dua frazo, kio multe ridigis nin. Li bone kantis la antaŭajn du vortojn de la pola pola kanto “Deksesjara Bruna Junulino”, sed kiam li kantis la sekvantajn vortojn, lia tono leviĝis kiel soprano, tamen li neniam rifuzis kanti en renkontiĝo de samideanoj. Lia gaja rido enhavis iom da tristo. Tion sentis eĉ mi, dekkelkjara knabo. Tia tristo estis sama kiel tiu, kiun ni havis, kiam ni kantis la kanton “Sur Songhua-rivero”^A. Mi kaj miaj kamaradoj komprenis, ke la triston kaŭzis la longtempa okupado de la patrolando far la malamikoj kaj lia fuĝo al alia lando. Li kun granda fervoro partoprenis

nian nacistavan movadon kaj samtempe klopodis por liberiĝo de sia patrolando. Ni neniam demandis lin pri lia familio nek pri lia politika aktivaĵo ekster la kolegio. Inter ni ekzistis konfido, amikeco kaj entuziasmo. Li donis lecionon pri poemo en la mezgrada Esperanto-kurso gvidata de mi kaj korektis Esperantajn tagnotojn aŭ mallongajn artikolojn de saĝaj diligentaj kursanoj. Ĉiufoje, kiam li venis en nian Esperantan societon “La Verdemularo de Sun Yatsen Universitato”, ni estis tre ĝojaj kaj parolis kun li Esperante kaj eĉ tiuj, kiuj ne estis parolemaj, kaptis la okazon ekzerci sian langon. Same kiel Fedorĉak en Ŝanhajo, Elpin paroligis ĉiujn komencantojn en Kantono.

Tiam mi transprenis la supremeciitan societon fonditan de Liang Shuren, malfermis ĝian pordon al la socio kaj faris ĝin centro de la progresema Esperanto-movado de Kantono aŭ ĝustadire, centro de gejunuloj por partopreni en la kontraŭ-japana nacistava laboro kaj lernado de Esperanto, tiel ke en la societo oni aktivis ne nur en la Esperanto-movado. La societo fondis la grandan Esperantan akademian gazeton “La Verdemulo”, kiu eldonis nur 2-3 numerojn. Tiutempe ni povis peti monhelpon de la universitato por daŭrigi la eldonadon, tamen post interkonsiliĝo ni decidis ĉesigi la eldonadon. Ni opiniis, ke la akademia gazeto estas tro malproksima de la aktuala batalo, la ĉina nacio estas ĉe la kriza momento,

kaj kiu povas kviete sidi por skribi disertaĵon. Eble tio estis erara. Tamen ni tiel pensis antaŭ 50 jaroj. Ni, inkluzive de mi kaj Elpin, estis fervoraj por eldonado de alia gazeto: Mi preferis raportaĵojn pri la akra batalo en Ĉinio kaj li literaturaĵojn pri la batalo. Fine ni tro memfide eldonis du gazetojn samtempe: unu estis “El l’ Infero” kaj la alia — “Internacia Solidareco”, ambaŭ mimeografitaj. La unua aspektis kiel solfolia bulteno kaj la dua estis broŝurita. La frontpaĝoj de tiuj du gazetoj estis projektitaj de mi. Por la dua gazeto Elpin donis multajn konsilojn kaj liaj originalaj poemoj estis publikigitaj en ĝi. “El l’ Infero” eldonis kelkajn numerojn kaj atingis dekojn da landoj; kaj “Internacia Solidareco” eldonis eble nur unu kajeron. En 1983 mi vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno kaj vidis tie po unu numeron de la du gazetoj. “Internacia Solidareco” enhavas poemojn, prozaĵojn, kantojn, raportaĵojn kaj novelojn. Ĉar ĝi estis malbone mimeografita, Elpin diris al mi: “Mi tute seniluziĝis.” Ni ne havis monon por tipografio. Ĉar ĝi temas tute pri nacistavo, kion absolute malpermesis la universitataj aŭtoritatoj, tial ni ne povis peti ilian monhelpon. Tio estis ununura kunlaboro inter mi kaj Elpin. Malfeliĉe, la kunlaboro malsukcesis.

Post kiam la milito disvastiĝis tra la lando, Elpin forlasis Kantonon kaj iris al Hongkong, poste al Chongqing. En Hongkong kaj Chongqing mi kontaktiĝis kun li. Sed en la milita tempo ni ne povis fari Esperantan laboron. Ĉiam, kiam ni renkontiĝis, ni interparolis Esperante. La plej granda feliĉo en mia esperantista vivo estas, ke mi konatiĝis kun li, patriota literaturisto. Nia lasta renkontiĝo okazis tiam, kiam la malamikoj kapitulacis. Iun vesperon mi vizitis lin en lia loĝejo en Chongqing. Tie estis multaj

Esperanto estas la lingvo por mi



1. Sur mon - to: kaj step'in - di - an - aj - ĉa-
2. En den - sa a - fri - ka ĝan - ga - lo - la
3. Ĉe nor - da po - lu - so es - ki - moj - lo -
4. Sur tu - ta la vas - ta ter - glo - bo - en
5. Indi - an - oj, ni - gru - loj, es - ki - moj, ur-



1. sa - das kun la fa - mi - li', - kaj se vi pos -
2. bo - naj a - mi - koj de ni - jam sol - vis la
3. ĝa - dás en ne - ĝa gla - ci' - se i - li be -
4. ur - boj kaj te - ri - to - ri' -- tro - vi - ĝas sam -
5. ba - noj kaj bu - boj kaj mi - jam u - zas la



1. tu - las pa - ro - lon - kan - jo - no e - ĥa - das per
2. ling - van prob - le - mon - per tam - tam' el - iĝ - as la
3. zo - nas pa - ro - lon - aŭ - di - ĝas la tut - sa - ma
4. i - de - an - a - ro - kaj so - nas el bu - boj la
5. Za - men - hof - ling - von, - do vi - vu, pros - pe - ru la



1. kri'! - Es - pe - ran - to - es - tas la



- ling - vo por ni, por ni. Es - pe - ran -



- to - es - tas la ling - vo por mi! -

koreoj, kiuj parolis la lingvon tute ne kompreneblan por mi. Mi haste adiaŭis lin, ĉar mi devis iri al la sudo. Post la milito mi venis en Ŝanhajon kaj ĉie demandis pri li, sed estis neniuj informoj pri li. Post la liberiĝo de Pekino en

1949 mi venis al tiu urbo kaj demandis ĉinojn kaj alilandanojn por havi informojn pri li, sed malsukcesis. Iuj diris, ke li ankoraŭ vivas, bone vivas kaj sin dediĉas ankoraŭ por la alta idealo en iu loko. Mi esperas, ke tio

estos vera. Mi deziras feliĉon al li, granda amiko, kune kun kiu mi pasigis malfacilajn tagojn en la juneco. ■

*Ĉina kanto temanta pri la sapiro de rifuĝintoj al la hejmloko okupita de japanaj agresantoj

ESP-NOVAĴOJ

●En la 25-a de decembro, 1990, fondiĝis la Tumen-a Esperanto-Asocio de Jilin-provinco. En la fondkunveno oni elektis prezidanton kaj vicprezidantojn de la asocio, samtempe akceptis 41 esperantistojn kiel la unuajn membrojn de la asocio.

●Antaŭ nelonge la Linhai-a Knabodomo kaj la Porinfana Televida E-kurso de la urbo de Zhejiang-provinco kune funkciigis kurson pri scioj de fremdlingvoj por geknaboj kaj infanoj. Ili ĉefe konigis al la knaboj kaj infanoj la historion, nunan staton, disvolviĝon kaj aplikadon de Esperanto, kaj aliajn Esperantajn fundamentajn sciojn.

●Komence ĉijare, la Jinan-a Esperanto-Asocio de Shandong-provinco organizis tri aktivadojn pri Esperantaj lernado kaj instruado. Post tio, la asocio faris en la Shandong-provinca Teatro novjaran vesperon, kiun ĉeestis pli ol 60 esperantistoj.

●Februare de 1991, la Jilin-a Esperanto-Instituto okazigis laborkunvenon, en kiu oni diskutis pri laboroj de la kuranta kaj

venonta jaroj, ekzemple kulturaj esperantistojn, altigi Esperantan nivelon, disvolvi turisman servon kaj enkonduki teknikojn.

●De la 27-a ĝis la 30-a de marto, 1990 okazis en la protestanta kolegio de Aneho la Unua Kongreso de Esperanto en Togolando. "Esperanto kaj Paco", la temo de la kongreso kaptis la atenton de multaj homoj. Partoprenis en la kongreso 123 esperantistoj el 9 togolandaj kluboj kaj 8 beninanoj.

La Unua Afrika Kongreso de Esperanto okazis en Togolando de la 7-a de decembro, 1990 ĝis la 2-a de januaro, 1991. Partoprenis ĝin 97 afrikanoj el 5 landoj, 5 eŭropanoj el 4 landoj kaj 2 usonanoj. La viglaj kaj interesaj prelegoj kaj diskutoj kaptis multajn atencojn.

La 2-a Afrika Kongreso de Esperanto okazos en decembro 1991 en Benino.

●Iniciata grupo de Movado "Per amikeco al unueco" planas organizi piedmarŝon de Uralmontaro ĝis Atlantiko. La itinero: Ĉelabinsk—Moskvo—Varsovio—Berlin—Antverpen—Bruxelles—Parizo—Brest. Partoprenantoj estas bonvenaj.



La Chengde-a Esperanto-Asocio de Hebei-provinco fondiĝis januare. Jen ĝia fondkunveno.

Proponojn kaj demandojn bonvolu skribi al Aleksandr Ŝatrov, 454116 USSR, Ĉelabinsk, Komarova, 110"A"-11

●De la 7-a ĝis la 19-a de januaro 1991 la aŭstraliaj esperantistoj aranĝis Esperantan Somer-Lernejon.

La 28-a Aŭstralia kaj la 57-a Novzelanda Esperanto-Kongresoj okazos kune de la 11-a ĝis la 19-a de januaro 1992 en la universitato de Okcidenta Sidnejo kaj en Richmond.

●La 69-a Germana Esperanto-Kongreso okazos en Munkeno, de la 17-a ĝis la 20-a de majo 1990.

Partoprenantoj de la Unua Afrika Kongreso de Esperanto en Togolando



Valora didaktika legolibro

— Pri “Bovisto kaj Teksistino”

de DON HARLOW (Usono)

En la 4-a numero de ESPERANTO USA de 1990, la organo de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, aperis recenzo de ĝia redaktoro s-ro Don Harlow pri la libro “Bovisto kaj Teksistino” eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĉi-sube ni aperigas lian recenzon en mallongigo.

La Red.

Historie, la fabeloj same grave rolas en la Esperanta literaturo kiel en aliaj. Unu el la solaj restantaj fragmentoj de Esperanto de 1881 estas parta traduko de “La Ombro” de Hans Christian Andersen, kies plena verkaro poste aperis sub la plumo de Zamenhof, kaj eble antaŭ naŭ jaroj Iltis reldonis la Kabetradukon de kelkaj fabeloj de Fratoj Grimm. Sed pri la lastatempa eldonado ĉefe respondecas la ĉinoj, kiuj estas ankaŭ konataj pro siaj belaj kaj malmultekostaj infanlibroj en Esperanto. Ĉi tiu volumeto “Bovisto kaj Teksistino” estas, se mi ne eraras, la sesa en la serio, kiu komenciĝas per “Rakontoj pri

Afanti”. Same kiel la ceteraj en la serio, ĝi estas valora didaktika legolibro por postkomencantoj, pro la relative simpla lingvaĵo kaj pro la mallongeco de la enhavaĵoj; sed la noveloj ankaŭ estas interesaj en si mem.

El la kvar fabeloj, la plej frua, “Meng Ĝjangnju”, estas la historio de virino, kies novedzo estis sklavigita por laboregi ĉe la Granda Muro en la fora nordo; kaj la plej lasta, “La Blanka Serpento”, traktas du fratinojn-serpentojn, kiuj homiĝas kaj, kune kun la edzo de unu el ili, devas lukti kontraŭ malbonintenca bonzo.

Por mi, pli interesaj estas la du centraj fabeloj. Mi ofte legis en la Esperantlingva ĉina literaturo menciojn pri Bovisto (stelo Altairo), Teksistino (stelo Vego) kaj la Arĝenta Rivero (ni nomas ĝin la Lakta Vojo), kiu disigas ilin. Temas pri bovisto, kiu enamiĝas al feino; la disiganto estas la senkompata reĝpatrino, kiu per sia harpinglo elskrapis la Arĝentan Riveron. El la fabelo mi fine komprenis la devenon de tiuj nomoj.

Pli trafa estas “Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj”. Tiun fabelon mi antaŭ kelkaj jaroj la unuan fojon aŭdis (ne legis) de amikino, kiu donacis al mi la sonbendon “La Papi liaj Geamantoj”. Temas pri junulino Ĝu Jingtaj, kiu por fariĝi klera devis alivesti sin kiel knabon, sed poste, ŝi enamiĝis al lernejkolego, kiu ne sciis pri ŝia ineco. Prokrastoj kaj nekomprenejoj, kaj feŭdismaj kutimoj, kondukis al neevitebla tragedio.

Interesa kaj informa estas la postparolo de kompilinto Hŭa Ĝjiĉing; mi malkonsentus nur (el okcidentana vidpunkto) kun lia konkludo, ke “la herooj kaj heroinoj en la kvar popolaj rakontoj havas ĝojigan aŭ iagrade tolereblan finon”. Neniu el ili postvivas, laŭ la okcidenta formulo, “feliĉe kaj por ĉiam”. La tradukoj de Censinio kaj akademiano Seimin estas nekritikeblaj.

Forte rekomendata libreto. ■



Feliĉo por hemiplegiuloj

de SUN GUOLIANG kaj KONG FUTAI

TAYUAN-hospitalo en Haidian-distrikto, Pekino, estas kuracejo ordinara. Tie laboras 60 kuracistoj kaj flegistinoj. La hospitalo konsistas el du kortoj, unu ambulatorio kaj unu malsanulejo kun 70 litoj. Ĝi resanigis multajn suferantojn de cerba trombozo aŭ cerba hemoragio. Kuracite, 40% de la pacientoj resanigis kaj 89.2% de ili ricevis bonan kuracefikon.

Foje, ni demandis kuraciston Huo Fenglin.

“Kial oni faras likvoinjektadon al ĉiuj pacientoj?”

“Likvoinjektado estas nia ĉefa metodo por kuraci hemiplegiulojn, t.e. injekti likvaĵon el medikamentoj eŭropa kaj ĉina en la korpon de malsanulo.”

Huo diris al ni, ke por kuraci hemiplezion kaŭzitan de cerba trombozo, antaŭ ĉio, kuracisto injektas al la suferanto malaltmolekulan dekstrozon kaj ligustrazinon. Se la paciento suferas de kormalsano, oni do injektas al li likvaĵon el komputa *dansen*-o (*Codonopsis pilosula*) kaj samtempe donas al li ĉinan medikamenton. Post unu seanco (du-tri semajnoj) oni injektas al li malfortan kloridan acidon kaj vipuran antiacidan enzimon. Post kiam la mal-

sano malserioziĝas, oni do faras al li akupunkturon, masaĝon kaj fine kinezoterapion. Por kuraci cerban hemoragion, oni devas injekti al la suferanto hemostazan likvaĵon kaj malaltigi cerban premon, antaŭ ol kuraci paralizon.

“Bonvolu konigi la sciencan bazon de la kuracado,” ni petis.

“Por simple diri, tio estas vigligi sangcirkuladon kaj forigi kongestaĵon por restarigi la normalan funkcion de la cerbaj angioj, ĉar likvoinjektado estas la plej bona metodo por asimili medikamenton kaj pliigi ĝian kuracefikon.”

“Post kiom da tempo ekefikas la kuracilo?”

“Ĝenerale dirite, tio okazas post unu seanco, sed la resaniĝo — post tri-kvar seancoj, alivorte, post ĉ. du monatoj.” Huo aldonis: “Ne ĉiuj hemiplegiuloj povas resaniĝi. Ju pli longa la malsano, des pli malfacila la kuraco. Se oni estas kuracata en du semajnoj post la malsaniĝo, do la kuracefiko estas plej bona.”

En la koridoro de la hospitalo ni vidis pacieron, kiu iris gardate de kuracisto. La paciento diris al ni, ke li estas Mao Zhanhua, 40-jara laboristo. Antaŭ sia enhospitaliĝo li estis tute paralizita. Post 10-taga kuracado li povis mem iri. Li estis tre kontenta pri la kuracado.

46-jara laboristino Liu Shuling estis trafita de cerba hemoragio. Antaŭ sia enhospitaliĝo ŝi suferis de la dekstra hemiplegio kaj malklara konscio kaj ne povis reteni sian fekadon kaj pisadon. Post unusemajna kuracado ŝi resaniĝis.

Ĝis nun la hospitalo kuracis pacientojn el pli ol 20 provincoj de Ĉinio. Ĝi volonte servas ankaŭ al eksterlandaj malsanuloj kaj taskis al sep fakuloj la laboron. Tie estas oportuna kuracado kaj loĝado. Du hoteloj proksime de la hospitalo volonte servas al eksterlandanoj.


Adreso de la hospitalo: Huayuan beilu, Haidian qu, Beijing, Ĉinio. Poŝta kodo: 100083; Telefonnumero: 201 0674. Antaŭ via alveno al la hospitalo bonvolu sciigi ĝin letere aŭ telegrame, por ke ĝi faru aranĝon anticipe. ■

Kinezoterapio






Wang Guifen faras metiartaĵon.



Umefloroj kaj pavo faritaj el spongeca plasto

Bildoj faritaj el ŝtofpecoj




Senvaloraĵoj utiligeblaj

Fotoj de LIU SIGONG

Wang Guifen estas emerita laboristino. Ŝi ŝatas tajĝiĉjūan-ekzercojn kaj kudradon. Foje ŝi provfaris por la edzo cindrujon el eluzita ladskatolo, kiun admiris la tuta familio. De tiam ŝi absorbiĝis en farado de malgrandaj ornamaĵoj. En la lastaj du jaroj ŝi faris pli ol cent diversformajn metiartaĵojn el eluzitaj ladskatoloj, ovoŝeloj kaj ŝtofpecoj, kion alte taksis respondeculoj de kulturaj fakoj.

Imitaĵoj de antikvaj tablo kaj seĝoj faritaj el eluzita ladskatolo



Ĉina-usona kompanio kun aparta administra metodo

LA profundan nokton de la 7-a de oktobro 1990, testinte la lastan specimenon de urino, iom malstreĉiĝis laborantoj de la Ĉina Centro de Testo de Stimuliloj. Ĝis tiam la centro senerare testis 673 specimenojn de urino de diverslandaj sportistoj, kiuj partoprenis la 11-an Azian Sportkunvenon en Pekino kaj sukcesis en ekzameno pri testo de 6 specimenoj de urino alportitaj de sendito de la medicina komisiono de la Internacia Olimpika Komitato.

Post kelkvara diligenta laborado sciencistoj kaj teknikistoj de la Ĉina Centro de Testo de Stimuliloj fine ricevis kvalifikiĝateston de la Internacia Olimpika Komitato. Ili bone komprenas, ke unu el la ĉefaj kaŭzoj de la sukceso estas, ke la kemiaj analizaj instrumentoj uzataj de la centro ĉiuj estis produktitaj de la Usona Hewlett-packara Kompanio kaj la tuta procezo de muntado, provado, riparo kaj funkciigo de tiuj altprecizaj instrumentoj kaj trejnado de teknikistoj estis plenumitaj de la Ĉina Hewlett-packara Limigita Kompanio, nova kolego de la Usona Hewlett-packara Kompanio.

La ĉina-alilandaj entreprenoj estas rezulto de la reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio. Ĝenerale, tiuj entreprenoj havas multan kapitalon kaj avangardajn ekipaĵojn kaj teknikojn, kaj krome la ĉina registaro praktikas politikon favoran al ili, tial ili disvolviĝis

rapide. Ne estas escepto ankaŭ la Ĉina Hewlett-packara Limigita Kompanio funkciigata de Ĉinio kaj Usono. Ĝi fondiĝis en 1985 kaj estas la unua altteknika elektronika entrepreno de Ĉinio kaj Usono. Atentokapta estas tio, ke en la sinsekvaj 3 jaroj ekde 1988 ĝi enviĝis inter la 10 plej bonaj ĉinalilandaj entreprenoj. Ĝian sukceson oni ŝuldas ne nur al ĝia supereco, kiun posedas ĉiuj ordinariaj entreprenoj, sed ankaŭ al ĝia aparta administrado. Tio profunde impresis min, kiam mi ĝin vizitis.

En la komenco de marto en Pekino estis iom malvarme. Tamen, kiam mi eniris en la domon de la kompanio, mi tuj eksentis printempon. La modernaj ekipaĵoj kaj la labormedio kun fresaj floroj kaj verdaj plantoj havi-

gis al mi agrablan kaj kvietan senton. Fraŭlino Shen de la sekcio de publikaj rilatoj diris al mi: "Laŭble doni al laborantoj bonan labormedion kaj bonajn laborkondiĉojn estas unu el la taskoj de administrado ĉiam atentataj de la kompanio."

En tiu kompanio mi vidis, ke la administraj kabinetoj kaj la sekcioj de fakaj rilatoj, vendo de produktaj kaj trejnado de klientoj, ĉiuj estis ekipitaj per komputila sistemo. Oni povas diri, ke tie estas komputila mondo. Ĉe malgranda produktolinio inĝenieroj serioze kontrolis kaj pakis komputilajn pecojn jam testitajn. Fraŭlino Shen konigis al mi, ke la kompanio havas pli ol 370 laborantojn, ĝia stabo estas en Pekino, kun filio en Ŝanhajo kaj produkta bazo en

En kabineto de la kompanio



Shenzhen. Nun la kompanio jam fariĝis modelo de ekspluato, produktado kaj vendo. Tie oni ne vidas amason kaj amason da laborantoj, ĉar tie montriĝis altteknika koncentriĝo. En la nuna altteknika elektronika kampo komputiloj karakteriziĝas per malgranda produktokvanto kaj rapida ŝanĝiĝo. Por akomodi sin al la bezono de la merkatoj en- kaj eksterlandaj kaj la disvolviĝo de la nova tekniko, la kompanio persistas en dinamika importo de avangardaj produktadoj kaj tekniko de la Usona Hewlett-packara Kompanio. Tia importado ebligas al ĝi ĝustatempe plibonigi kaj renovigi siajn produktadojn por garantiu disvolviĝon samtempe kun la plej nova tekniko. En nur kelkaj jaroj la kompa-

nio produktis 12 specojn da produktadoj transdonitajn de Usono unu post alia kaj vaste ekuzis ilin en la kampoj scienc-teknika, industria, eduka kaj higiena.

Fraŭlino Shen diris, ke antaŭ 5 jaroj ŝi forlasis sian profesion en ĉina entrepreno kaj eklaboris en la Hewlett-packara Limigita Kompanio post rigora ekzameno. La kompanio ne ŝparas monon kaj energion por havigi al si talentulojn. Ĉiuj fakuloj kaj administristoj estas akceptitaj post ekzameno, kio garantias al la kompanio altnivellajn laborantojn. La akceptitaj laborantoj devas ricevi fakan trejnadon. Ĉiu laboranto ĉiujare devas difini sian labor-celon kaj en jarkon oni faras kontrolon. Laŭ lia laboro la direktoro donas al li

poentojn, kiuj rekte influas lian salajron. Tia administra metodo estas nedisigebla de la alta taksado de la kompanio pri la faktoro de homo.


En tiu flanko la kompanio laŭeble kreas bonan labormedion kaj bonajn laborkondiĉojn por la laborantoj, por ke ili povu plene elvolvi sian talenton. Ĉiu laboranto povas interŝanĝi opiniojn kaj diskuti pri laboro kun sia direktoro. Por doni oportunon, la kabinetoj de ĉiuj direktoroj estas sen pordo, kaj oni nomas tion pordomalferma politiko.

Rilate la administradon de la kompanio, ĝia vicĉefdirektoro Ren Shouqin diris, ke administrado apartenas al la entreprena kulturo, kaj ĉina-alilanda entrepreno estas ĉe la limo de du kulturoj. Lerteco en administrado estas nepra tendenco. La aparta administra metodo de la Ĉina Hewlett-packara Limigita Kompanio estas produktita de tute diferencaj kulturoj de Ĉinio kaj Usono, en kadro permesita de la ĉina leĝo, laŭ la ĉinaj kondiĉoj kaj en stilo de la administrado de la Usona Hewlett-packara Kompanio. Ĝi konformas kaj al la ĉina diro "fidi la amasojn kaj sin apogi al la amasoj" kaj al la usona diro "respekti kaj fidi la homojn". Tio montriĝas en du flankoj: unu estas kombino de la bezono, celo kaj profito de la disvolviĝo de la kompanio kun tiuj de la disvolviĝo de individuo. Tio ne signifas, ke individuo absolute obeas organizon, nek ke individuo sidas super organizon. La alia estas kombino de eduko pri moralo kun stimulo per mono kaj materialo.

Dum la vizito mi informiĝis, ke ekde sia fondiĝo la kompanio ĉiam rigardas kontentigon de la bezono de klientoj kiel sian devon, strebas al la avangardeco de produktado kaj vendo kaj ĉufoje gajnis la unuan premion en- kaj eksterlande inter komputilaj fabrikoj, pro fidiĝo de produktadoj.

Efektivigo de ĉiufanka administrado de kvalito ebligis al la kompanio gajni respekton, fidon


En klientoservejo de la kompanio




kaj subtenon de klientoj en intensa merkata konkurenco. Ĉiujare ĉiuj sekcioj de la kompanio ellaboras jarplanon, starigas grupon de kvalita administrado kaj difinas enhavon de kvalita administrado post resumado de la lastjara laboro. En la pasintaj jaroj nemalmultaj grupoj de kvalita administrado de la kompanio atingis grandan sukceson. Krome, la sekcio de kvalita administrado de la kompanio sendas enketilon periode al klientoj por peti iliajn opiniojn pri diversaj laboroj de la kompanio, kaj la opini-transdona sekcio de la kompanio transdonas iliajn opiniojn, proponojn kaj urĝajn dezirojn al rilataj direktoroj, por ke ĉi tiuj tuj sendu inĝenieron solvi iliajn problemojn.

La Ĉina Hewlett-packara Limigita Kompanio disvolviĝas ĝuste pro tio, ke ĝi dependas de la aparta administra metodo, scienca kaj ĉiufanka kvalita administrado kaj altnivelaj talentuloj surbaze de du kulturoj. ■

La informa servo de la kompanio



Muntado de komputiloj



Trejnado



MODERNAJ VESTOJ



Printempaj vestoj

Foto de LI GUANGRONG

La printempaj vestoj, portataj de la manekeno, estas projektitaj de juna vestoprojektisto Xia Jingjie. Ili gajnis la unuan premion en la Dua Ĉina Vestoprojekta Konkurso de Ora Tondilo. La blua kaj nigra koloroj de la vestoj harmonias kun tiuj de la ĉapelo. La vestoj estas simplaj kaj tre ŝatataj de junuloj.

Vojo al bonstato en la ĉina kamparo

LA aŭto veturis sur la ŝoseo en la gubernio Jin-ing de Shandong-provinco. Mi kaj mia kunvojaĝanto, guberniestro Tian, dronis en meditado. La juna guberniestro de 30 jaroj devis iri en la kamparon por fari enketon. Eble nun li estis konsideranta pri sia komplika laboro, dum mi estis remaĉanta lian diron: "Se en Ĉinio la infanoj naskiĝus malpli multe je centoj da milionoj, ni guberniestroj sentus nin multe pli facilaj en la laboro, kaj la vivo de la kamparanoj estus pli bona."

Ni estis irantaj al subgubernio Liuhang. Kiel statas la vivo de la tieaj kamparanoj? En la kunveno de la subgubernia registaro mi informiĝis de kamarado Wang, estro de la subgubernio, ke en la subgubernio estas 29 vilaĝoj kun 1 622 familioj el 26 301 homoj. Ĉiu homo de la loko disponas ĉirkaŭ 13 arojn da agroj kaj unu tunon da greno, kaj la meznombra jara enspezo de ĉiu lokano estas 900 juanoj (5 juanoj = 1 usona dolaro).

La ciferoj konvinkis, ke la stato de la kamparanoj de Liuhang estas pli bona en komparo kun multaj aliaj lokoj de Ĉinio. Kompreneble mi ne sugestis, ke la enspezo de la lokanoj estas la plej multa — meznombra jara enspezo de 900 juanoj estas kompare bona, sed ne la plej bona. Sed la agroj kaj greno meznombre disponataj de la lokanoj estas la plej multaj en la ĉina kamparo, ĉar meznombre ĉiu kamparano en Ĉinio disponas nur 8.7 arojn da agroj kaj 365 kilogramojn da greno.

"Kiel statas la agraro kompare

kun tiu antaŭ dek jaroj?"

"Kompreneble malmultiĝis la agraro, ĉar novaj fabrikoj kaj loĝdomoj bezonis lokon. Sed la meznombra areo de ĉiu membro malmultiĝis ne akre." Por klarigi tion, kamarado Wang aldonis, ke la subgubernio bone observas la naskolimigon, kaj en la lastaj dek jaroj infanoj naskiĝis malpli multe je 5 000, la natura naskokvanto en la lastaj kelkaj jaroj estis limigita je malpli ol 7.7 milonoj, kaj 98.7 procentoj de la naskopovantoj observas la naskoreguladon.

Guberniestro Tian diris al mi, ke en 1986 la subgubernio Liuhang estis honorita de la Ŝtata Naskoregula Komisiono per tutlanda modelo en observado de naskoregulado. Sed en multaj aliaj lokoj naskolimigo estas malfacile praktikebla, kaj mi tre volis scii, kiel oni praktikas naskoreguladon en Liu-

hang.

"La ĉina agrikulturo estas malmoderna, la kamparanoj vivas malfacile, kaj gevidvoj ne povas akiri minimuman vivtenon en kaduka aĝo. Krome, ĉinaj kamparanoj kredas, ke 'pli da infanoj alportas pli da bono'. Tial naskolimigo en la ĉina kamparo estas benediktana." Kamarado Wang diris, ke krom modernigi la agrikulturon, oni devas fari paciencegan admonadon al la kamparanoj kaj iafaje bezonas monpunon. Tamen rigora limigo ne estas sola rimedo; la ĉefa solvo estas persista admonado al la kamparanoj, por ke ili bone sciu la gravecon de naskoregulado kaj memkonscie observu ĝin. Oni diskonigas la loĝantaran teorion kaj observendecon de naskoregulado, diskonigas eŭgenikon kaj antikcipajn metodojn pere de radio, filmoj, teatraĵoj kaj bildoj. Ilia diskonigado estas interesa kaj la kam-

En ordinara familio de Bianchang-vilaĝo




paranoj ŝatas rigardi, aŭskulti kaj akcepti.

Nun ĉiu vilaĝo en la subgubernio havas servostacion kaj servoĉambron por naskoregulado, en kiuj laboras komisiitaj funkciuloj. Krome la subgubernio establis naskoregulan asocion el famuloj de la loko, por ke la naskoregulado neniam estu neglektata, ke la tuta socio kutimiĝu al naskoregulado.

Forlasinte la sidejon de la registaro de la subgubernio, ni veturis sur larĝa asfaltita landvojo al Bianchang-vilaĝo. Tra la fenestro de la aŭto mi vidis belajn domojn de lernejo. Kamarado Wang diris al mi, ke la kamparanoj de la subgubernio jam uzis pli ol 10 milionojn da juanoj por konstrui vojojn kaj lernejojn. Li faris por mi kalkulon: Se oni ne limigus la naskokvanton, la loĝantaro de la subgubernio multigiĝus je kvinmil; se ĉiu infano bezonus ĉiujare 900 juanojn por vartado, la tuta subgubernio devus uzi 4.5 milionojn da juanoj, do la vojoj kaj lernejoj devus resti sur papero.

Ni vizitis familion en la vilaĝo. La duetaĝa domo konsistas el 12 ĉambroj. La familio havas koloran televidilon, magnetofonon, meblaron kaj telefonon. La aranĝo en la ĉambroj portas kamparanan guston, sed neniom malpli bona ol tiu de urbanoj.

La domo de Cheng Shiting



Lernejo de Bianchang-vilaĝo

Forestis la mastro s-ro Cheng Shiting kaj la mastrino varme akceptis nin. Ŝi havas nur unu filon, la vivo estas bona, ĉiu familiano disponas 15 arojn da agroj, kaj meznombro ĉiu enspezas jare pli ol 1 500 juanojn. Por konstrui la domon en 1989 la familio konsumis 20 000 juanojn. Ŝia kontento estis evidenta.

“Ĉu vi kaj via edzo kulturatas sole agrojn aŭ faras ian alian okupon?”

“Ni estas terkulturistoj kaj dependas de la agroj. Nia enspezo venas sole de greno. Kompreneble nia bona vivo dependas ankaŭ de

tio, ke ni havas nur unu infanon. Se ni havus 3-4 infanojn, ni ne havus tempon por kulturati teron kaj apenaŭ povus vivteni la infanojn.”

Post tio ni vizitis tri familiojn en tri vilaĝoj. Ĉiu membro de tiuj familioj disponas ĉirkaŭ 17 arojn da agroj kaj enspezas pli ol 1 500 juanojn. Ĉiu el la familioj havas novan brikman domon. Membroj de la familioj malmultaj, sed agroj sufiĉaj, tial ili ĉiuj estas energioplennaj en laborado.

Sed en la hejmo de kamparano Wang Zhaobin ni vidis tute malsaman scenon: En tri malnovaj ĉambroj loĝas kvin familianoj. Antaŭ 1984 Wang havis nur unu infanon kaj la geedzoj estis energioplennaj en agrikultura produktado. Ili bredis pli ol 1 000 kokojn. Sed peste la geedzoj naskis ĝemelojn. Ili pene laboris, sed neniel povis iom plibonigi la vivon, kaj meznombro ĉiu familiano enspezis ĉiujare nur 300 juanojn. Fine ili vendis la kokojn.

Ĉe la foriro de la hejmo de Wang Zhaobin, kadro de la vilaĝo diris ŝajne al si mem: “Plimultiĝo de unu infano identas al duoniĝo de enspezo. Wang naskis du infanojn pli multe, kaj sendube pli multe malfaciligis lia vivo.” Ĉu lia konkludo povus esti nova, simpla kaj klara vidpunkto de la ĉinaj kamparanoj pri generado? ■



En ebonskulpta metiejo

Lignoskulpturo de Tanzanio

Teksto de **HAN RONG**
Fotoj de **LI SONGSHAN**

Inter la buntaj artoj de Afriko, la lignoskulpturo estas tre altira, dum la tradicia lignoskulpturo de la nacio Makonde de Tanzanio estas la plej originala kaj interesas la mondon. La Ŝtata Arta Komitato de Tanzanio dufoje okazigis en Pekino artan ekspozicion, kie la skulptaĵoj multe interesis la ĉinajn vizitantojn.

La materialo de la skulpturo de Makonde estas ebono. La ebonarboj kreskas en la tropikaj arbaroj en la sudoriento de Tanzanio. La ligno de la arbo estas tre malmola kaj masiva, la ŝelo palflava kaj maldika, dum la ligno estas violenigra. La arto havas historion de pli ol ducent jaroj. Ĉe la komenco oni skulptis nur maskojn por kulto kaj religia rito. Iuj el la homfiguroj jam fariĝis totemo. En la lastaj jardekoj, kiam artaĵoj fariĝis komercaĵoj, la skulptaĵoj de Makonde multe disvastiĝis en la mondo. Iliaj tranĉoj estas lakonaj kaj fluidecaj, la arta strukturo estas groteska kaj absurda, kaj ĝuste pro tio la simplaj, ŝajne krudaj kaj "sovaĝecaj" skulptaĵoj ekhavis novan artan valoron kaj formis novan artoskolon.

La fotoj publikigitaj en tiu ĉi numero montras bazon de ebonaj skulptaĵoj de Tanzanio kaj la faradon de la artaĵoj. En la lastaj dekelkaj jaroj, krom ebono, la artistoj skulptis ankaŭ alispecajn materialojn. Nun la eburaj skulptaĵoj estas la plej valoraj. Tiaj artaj ornamaĵoj tre plaĉas al la publiko. ■

Butiko de ebonskulptaĵoj



Pri la loĝantaro kaj naskolimigo de Ĉinio (1)

de ZHANG LEI

Niaj legantoj ĉiam zorgas pri la loĝantaro kaj naskolimigo de Ĉinio. De tiu ĉi numero ni konigos la estintan kaj estantan statojn de loĝantaro de Ĉinio, ŝarĝon, alportitan de la tro multa loĝantaro al ekonomia kaj socia disvolviĝo, praktikon de la politiko pri naskolimigo en Ĉinio k.a.

La Red.

Ĉinio estas lando kun la plej multa loĝantaro en la mondo. La statistiko pri la kvara tutlanda censo de la loĝantaro farita en julio 1990 montris, ke la totala loĝantaro sur la kontinento de Ĉinio atingis 1.133 miliardojn, kiuj konsistigis ĉ. 21% de tiu de la mondo. Ĉinio estas disvolviĝanta lando. La problemo pri loĝantaro estas tre grava en ĝia ekonomia kaj socia disvolviĝo, tial praktiki la politikon pri naskolimigo kaj plialtigi loĝantaran kvaliton estas fundamenta politiko de Ĉinio.

GRANDA BAZA NOMBRO DE LOĜANTARO

La fundamenta karakterizaĵo de la ĉina loĝantaro estas tro granda baza nombro, rapida kresko kaj malalta kvalito.

Antaŭ la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko la reproduktiĝo de la ĉina loĝantaro karakteriziĝis per tradiciaj altaj nasko- kaj mortokvantoj kaj malalta natura kresko. Post longtempa malrapida kresko la nombro de la ĉinaj loĝantoj atingis 0.54 miliardon en 1949 kaj tiel ekhavis grandan bazon. En la pasintaj 40 jaroj, kun la disvolviĝo de socio kaj ekonomio, pliboniĝo de la popola vivo kaj progreso de la afero de medicino kaj higieno, la loĝantara reproduktiĝo rapide transiris al alta naskokvanto, malalta mortokvanto kaj alta natura kresko. De la 70-aj jaroj ĝi transiris al reproduktiĝo karakterizita per malaltaj naskokvanto, mortokvanto kaj natura kresko. Nun la nombro de loĝantoj sur la kontinento de Ĉinio estas 1.133 miliardoj, pli-ol-duoble kiom tiu en 1949. Kvankam multe malrapidiĝas nun la kresko de la loĝantaro, kompare kun tiu en la 50-aj kaj 60-aj jaroj, tamen ankoraŭ estas tre granda la absoluta kresko. En la lastaj jaroj en Ĉinio ĉiujare la loĝantaro pliiĝis je 17 milionoj.

Malpli alta estas la fizika kaj kultura kvalito de ĉinoj. La okulfrapa manko de la fizika kvalito estas, ke la handikapuloj konsistigas gravan parton en la

tuta loĝantaro. Ĉinio havas pli ol 50 milionojn da handikapuloj, t.e., po kvin familioj havas unu handikapulon. Ĉiujare naskiĝas ĉ. 380 000 handikapuloj. Tio alportas pezan ŝarĝon al la socio kaj familioj. La averaĝa klereco de ĉinoj egalas nur al tiu de elementlernejano, kaj Ĉinio apartenas al la disvolviĝantaj landoj kun primara klerigo kiel la ĉefa rimedo. Inter la 30 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj (escepte de Taiwan-provinco) de la tuta lando estas nur 12 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, kies loĝantaro kun almenaŭ mezgrada klereco estas pli granda ol tiu kun elementa klereco. Tio ne respondas al la moderniga konstruado de la lando kaj la deziro de la vasta popolo pri kulturo.

La alia karakterizaĵo de la ĉina loĝantaro estas, ke la loĝantaro de la kamparo konsistigas grandan procenton kaj ĝia kresko estas pli rapida ol tiu en la urboj. La loĝantaro de la ĉina kamparo konsistigas 73.77% de la loĝantaro de Ĉinio. Pro la limigo de ekonomio, kulturo kaj aliaj faktoroj, estas malfacile praktiki naskolimigon en la ĉina kamparo. De 1971 la naskokvanto de la kamparo estis je 50% pli granda ol tiu de la urboj. En la 80-aj jaroj la urba naskokvanto estis nur 1.36%, dum en la kamparo ĝi estis 2.84%, kio montris, ke redukti la kreskon de la kampara loĝantaro estas ŝlosilo por redukti tiun de la ĉina loĝantaro.


ŜARĜO POR EKONOMIA KAJ SOCIA DISVOLVIĜO

En la ekonomia kaj socia disvolviĝo de Ĉinio, tro rapida kresko de loĝantaro multe malhelpas la pliboniĝon de la materia kaj kultura vivo de la popolo, kaj ekzistas evidenta kontraŭdiro inter ĝi kaj utiligo de riĉfontoj.

Tro rapida kresko de loĝantaro malhelpas la pliboniĝon de la materia kaj kultura vivo de la popolo. En Ĉinio rapide pligrandiĝas la produktokvantoj de kotono, greno, manĝoleo, viando, ŝtofo, karbo, cemento kaj hejmaj elektraj aparatoj. Plejparto de ili okupas la unuan lokon en la mondo. Ankaŭ la produktokvantoj de ŝtalo, elektro, petrolo kaj kemifibroj okupas unuajn lokojn en la mondo. Tamen, la pokapaj kvantoj por ĉinoj estas malgrandaj. Ili kreskas malrapide kaj iuj el ili eĉ malleviĝas. Ni prenu grenon kiel ekzemplon. La produktokvanto de greno



Sur strato



Solinfano kaj ĝiaj gepatroj

de Ĉinio okupas la unuan lokon en la mondo kaj antaŭ longe superis tiun de Usono titolita kiel greno de la mondo. La mua (15 mu-oj egalas al unu hektaro) produktokvanto de tritiko superis tiun meznombro de la mondo je 40%, tamen la pokapa kvanto estas malpli granda ol tiu de multaj landoj. La totala produktokvanto de greno de Ĉinio en 1989 kreskis je 148% kompare kun tiu en 1952, tamen la pokapa kvanto de greno kreskis je 26%. En kelkaj jaroj depost 1984 la grena produktokvanto de Ĉinio restis preskaŭ senŝanĝa. Kun kresko de loĝantaro la pokapa kvanto de greno reduktiĝis jaro post jaro. En iuj lokoj la pokapa kvanto de greno kreskis je nur kelkaj kilogramoj en la 80-aj jaroj, kompare kun tiu en la 50-aj jaroj. Pro la kresko de loĝantaro kaj la konsumo ŝvelado, des pli evidentiĝos en Ĉinio la kontraŭdiro inter bezono kaj livero de greno. Laŭ takso de fakuloj, por teni la nunan pokapan kvanton de greno ĝis la fino de la kuranta jarcento, la mua produktiveco de Ĉinio devas egali al 3-oblo de tiu de la mondo, kio estos treege malfacila.

Tro rapida kresko de loĝantaro alportas grandajn malfacilojn en loĝado, trafiko, kuracado, eduko kaj laborado. En 1989 la pokapa loĝareo en urboj estis 6.6 kvadrataj metroj, ĉiu dekmilo da urbanoj posedis 4.6 aŭtobusojn, kadre de la tuta lando ĉiu dekmilo da homoj havis 23.3 malsanulajn litojn kaj 15.6 kuracistojn kaj el ĉiu dekmilo da homoj estis 18.8 studentoj. Ĉiujare pli ol dek milionoj da homoj ricevis laboron.

Tro rapida kresko de loĝantaro malhelpas ankaŭ la akumulon de kapitalo por ekonomia konstruado. Tiu kapitalo akumuliĝas ĉefe de la lando, tamen pro tro rapida kresko de loĝantaro, ĉiujare oni devas asigni, antaŭ ĉio, sufiĉe grandan parton el la negranda nacia enspezo por kontentigi la fundamentan

bezono de la popola vivo kaj plibonigi ĝin jaro post jaro. Laŭ takso de koncerna departemento, de 1985 ĝis 1989, 24.1% de la pliiĝinta nacia enspezo de Ĉinio estis uzataj por la vivo de la pliiĝinta loĝantaro, tio ne povis ne redukti la akumulon de kapitalo kaj malhelpi ekonomian disvolviĝon. Sub la nunaj kondiĉoj ankoraŭ restas granda problemo kontentigi la bezono de la popola vivo kaj plialtigi la fizikan kaj kulturalan kvaliton de la loĝantaro. Tio influas ne nur ekonomian disvolviĝon kaj sciencan progreson, sed ankaŭ la pligrandiĝon de naciaj fortoj.

Estas nesufiĉa la pokapa riĉfonto de Ĉinio. Tro granda loĝantaro donas ĉiam pli grandan premon al tero, dolĉakvo, arbaro, stepo kaj diversaspecaj riĉfontoj. La kulturata tero de Ĉinio konsistigas nur 7% de tiu de la mondo, tamen vivtenas 21% de la loĝantaro de la mondo. De 1949 ĝis nun pli-ol-duoble kreskis la ĉina loĝantaro, dum la pokapa kulturata tero reduktiĝis de 2.7 muoj en 1949 al la nunaj 1.3 muoj, nur je 1/4 kiom tiu de la mondo. Ĉinio estas la kvina lando kun giganta akva riĉfonto, tamen kun kresko de loĝantaro, la pokapa kvanto de riverakvo pluapase reduktiĝas. La pokapa kvanto de dolĉakva riĉfonto egalas nur 1/4 de tiu de la mondo. Manko de akva riĉfonto grave influas urban akvoprovizion kaj kamparan irigacion. Se oni ne bremsas la tro rapidan kreskon de loĝantaro, tiam daŭre reduktiĝos pokapa riĉfonto kaj detruigiĝos ekologia medio, kio kaŭzos pli grandan malfeliĉon al la posteuloj.

Tio postulas, ke dum ekonomia disvolviĝo Ĉinio strikte bremsu tro rapidan kreskon de loĝantaro, por ke la loĝantara kresko konformu al la socia kaj ekonomia disvolviĝo kaj la utiligo de riĉfontoj harmoniu kun ekologia medio. Tio celas kiel eble plej rapide forigi la malriĉecon, fortikigi la landon kaj feliĉigi la posteulojn. ■



Infanoj prezentantaj

AMIKECO INTER NI

Fotoj de HAI FENG

La dekjara praktikado de la reforma kaj pordmalferma politiko konigis la mondon al Ĉinio kaj Ĉinion al la mondo, pligrandigis la kunlaboron de Ĉinio kun aliaj landoj kaj faris kontribuon por la paco kaj prospero de la mondo. Okaze de la Printempa Festo ĉi-jare, la Pekina Televizio kaj Guibinlou-hotelo de Pekino kune aranĝis la amuzkunvenon "Amikeco inter Ni" por plioftigi kontaktiĝon inter diverslandaj popoloj. Al ĝi oni invitis diverslandajn gastojn, kiuj kun ĉinoj amuzis sin per ludoj, konkursoj kaj prezentadoj.





Konkurso de surmeto de antikvaj ĉinaj vestoj




Ĉinaj kaj alilandaj amikoj kantas en la amuzkunveno.



Konkurso de blovestingo de kandeloj

Faden-tredo



Prezentado de la akrobataĵo "Ekvilibrigo de Glasoj"



Gaja mondo

Teksto kaj fotoj de LING YOUJUAN

Plejparto de miaj samgeneraciuloj pasigis sian tempon en infanĝardeno, antaŭ ol viziti elementan lernejon. Niaj gepatroj devis partopreni en la socialisma konstruado kaj infanĝardeno fariĝis loko por nia kreskado. Hodiaŭ ni vivas pli riĉan vivon kaj pliboniĝis la ekipaĵoj kaj administrado de la infanĝardeno. Tamen mi trovas, ke infanĝardeno estas mondo sensanĝa kaj ĉiam gaja.

Iutage mi vizitis la infanĝardenon, kiun mi forlasis antaŭ 20 jaroj.

La sidglitejo kaj karuselo en la korto kaj buntaj kretaj pentraĵoj sur muroj rememorigis min pri la malproksima pasinteco. Subite mi eksentis, ke la homa vivo mallongiĝis. Ŝajnis al mi, ke mi ne vizitis elementan kaj mezgradan lernejojn, kaj ke mi ne estis sendorma pro preparo al enira ekzameno por alt-lernejo... Mi dronis en bela rememoro kaj ekhavis la ideon neniam forlasi la infanĝardenon.





Reordigi la liton

Petolaj infanoj



Alilanda infano (dekstre)





"Surmetu šuon tiamaniere"



Kamaradetoj




En ludo





Instruado de danco



Flustro



Sur trabo

Orfadenaj jujubetoj de Leling

JUJUBO estas indiĝena produkto de Ĉinio. Estas 300-400 specoj de jujuboj. Inter ili la plej fama estas la orfadena jujubeto produktita en Leling, Shandong-provinco. Ĝi havas delikatan karnon sukeroriĉan. La seka jujubeto havas orajn fadenojn, kiuj vidiĝas ĉe dupartiĝo. Tial ĝi ricevis la nomon.

La jujubeto havas tre malgrandan kernon. Troviĝas ankaŭ alispeca senkerna jujubo kun delikata ŝelo. En la loko cirkulas mito pri senkerna jujubo.

Antikve en Leling vivis junulo ege ŝatanta pentri jujubarbon. Li amis knabinon. Iutage en la hejmo de la knabino la junulo trovis, ke sur muro de la gastoĉambro pendas pentraĵo de jujubarbo farita de li antaŭ du jaroj, kaj diris: "La pentraĵo estas ne tre bela." Ekster lia atendo, tion aŭdinte, la patro de la knabino opiniis, ke la junulo estas tro aroganta, forpelis lin el sia domo kaj malpermesis al sia filino intervidiĝi kun la junulo. Post nelonge la junulo mortis pro sopiro al sia amatino. Iutage, kiam la knabino ploregis antaŭ la tombo de la junulo, subite de sur jujubarbo falis jujubo kaj krevis en tri pecetojn. La knabino trovis ĝin senkerna. Tiam ŝi komprenis, ke li mortis de korfrakasiĝo.


Nature, tio estas nur mito. Efektive, en Leling oni komencis kulturigi jujubarbojn en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) kaj vaste kulturis ilin en la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911). Antikva libro diras,

ke "en Qingzhou-prefektujo produktiĝas jujubetoj dolĉaj kaj delikataj kun dika karno kaj eta kerno kaj ĝuas famon en la lando". Tiam Leling estis sub la prefektujo. Legendo diras, ke imperiestro Qianlong de Qing-dinastio (1644-1911) inspektis la regionon sude de Yangzi-rivero. Kiam li preterpasis la vilaĝon Duliuyin sude de Leling, li gustumis orfadenajn jujubetojn. Li multe admiris ilin, donis al la arbo la gloran nomon "Reĝo de Jujuboj" kaj pendigis la tabulon kun la nomo sur la arbo. Reveninte al sia palaco, li ordonis, ke ĉiujare oni elektu orfadenajn jujubetojn kaj portu ilin al la palaco por imperiestra ĝuo.

Septembre ĉie en Leling kreskas jujubarboj. Tie troviĝas ne nur parcelo post parcelo da jujubarboj, sed ankaŭ jujubarboj ĉirkaŭ la vilaĝoj kaj domoj. La maljunulo Shi Enqing diris al mi, ke en la lastaj jaroj la ŝtato kuraĝigis kamparanojn por kulturigi grenplantojn inter jujubarboj, tio donis al ili multan enspezon. Lia familio el tri membroj laŭkontrakte flegas 66 jujubarbojn de la kolektivo, ĉiu jujubarbo produktas meznombro 15 kg da sekaj jujuboj.

La jujubarboj rezistas kontraŭ sekeco kaj troa pluvo. Ili fruktodonas tri jarojn post plantado kaj abunde fruktas post 20 jaroj. Eĉ centjaraj arbegoj portas multe da fruktoj. La jujuboj estas unu el la ĉefaj enspezoj de la kamparanoj, tial ĉi tiuj rigardas la jujubarbojn fidindaj plantoj kaj monarboj.

Nun Leling havas 8 milionojn da jujubarboj, la jara produktok-



Sunumado de jujuboj

vanto de sekaj jujuboj atingas dek milionojn da kg, dekoble pli multe ol tiu de 1978. Ĉiujare Leling eksportas 800 000 kg. da sekaj jujuboj kaj estas difinita de la Forstokultura Ministerio kiel eksportata bazo de orfadenaj jujubetoj.

Pli ol 95% de jujuboj de Leling estas manĝeblaj. La seka jujubeto entenas fruktozon, proteinojn, vegetalinojn, feron, kalcion, fosforon k.a. Ĝia kvanto de fruktozo atingas 76%, la kvanto de vitamino C estas proks. centoble pli granda ol tiu de pomo kaj almenaŭ trioble pli granda ol tiu de kapsiko, kiu entenas pli da vitamino C. La jujubetoj estas ne nur nutroriĉaj, sed ankaŭ uzataj oficinale.

Jujubeto-prilaborado disvolviĝas. Antaŭe oni produktis nur jujubajn marmeladon kaj pulvoron, sed nun oni liveras enladigitajn jujubojn, bukanitajn jujubojn, jujuban sukron kaj la Ĉinan Mielvinon, kiu gajnis premion 18-foje en aliaj landoj. Iuj produktoj de jujuboj vendiĝas sur la internacia merkato. ■

Nia progreso ne hazarda

— Respondoj pri la Ĉina Naĝista Teamo

De la 4-a ĝis la 14-a de januaro 1991 okazis en Perth, Aŭstralio, la Sesa Monda Ĉampioneca Konkurso de Naĝo. En la konkurso de oficialaj sportbranĉoj Ĉinio gajnis sume ok orajn medalojn, nur malpli multe ol Usono, kaj per tio ĝi okupis la duan lokon en la mondo. Krome, Ĉinio gajnis ankaŭ tri orajn medalojn en la konkurso de mallongdistancaj naĝoj, kiuj estis difinitaj kiel neoficialaj sportbranĉoj.

Naĝo estas konata kiel baza sportbranĉo. La progreso de ĉinaj naĝistoj estas multe atentata en- kaj eksterlande.

Posttagmeze de la 13-a de januaro, Liu Ji, estro de la Ĉina Sportista Delegacio, kaj Chen Yunpeng, la ĉefstrejnisto de la Ĉina Naĝista Teamo, intervidiĝis kun ĉinaj kaj alilandaj raportistoj kaj respondis demandojn zorgatajn de ili.

La Red.


Jurnalisto de "Monda Naĝo" de Usono: Ĉu la Ĉina Naĝista Teamo kontentas pri sia sukceso en la konkurso?

Chen Yunpeng: Ni estas kontentaj pri la sumo de oraj medaloj gajnitaj en la konkurso, sed ne tre kontentaj pri la atingo de niaj naĝistoj.

Raportisto de la Asociita Inform-agentejo de Usono: Kial la ĉina teamo ne gajnis rimarkindan sukceson en la konkurso?

Chen Yunpeng: Antaŭ tri kaj duona monatoj ni partoprenis en la 11-a Azia Sportkunveno de Pekino. Por naĝisto estas tre malfacile havigi al si dufoje

Gao Min (dekstre) kaj ŝia trejnisto



porkonkursan apogon en tri kaj duona monatoj. Estas tiel ankaŭ por alilandaj naĝistoj. Ni preparis nin du jarojn por partopreni en la azia sportkunveno, sed ni havis nur 14 semajnojn antaŭ la konkurso.


Raportisto de la Asociita Inform-agentejo de Usono: Ĉu ĉinaj naĝistoj esperis rompi mondan rekordon en la konkurso?

Chen Yunpeng: Ni ne esperis tion, ĉar ni havis nur 14 semajnojn por prepari nin. Se ni havus kvin monatojn por tio, ni povus rompi mondan rekordon. Cetere, en Pekino kaj Perth regis malsamaj sezonoj. Restis al ni mallonga tempo por alkitimiĝi al la tiea klimato. Tio, kompreneble, estis faktoro malfavora al ni. Kaj krome, en la pasintaj jaroj niaj naĝistoj ne konkursis sub la libera ĉielo, ke ni ne povis alkitimiĝi al la tiea klimato. Mi pensas, ke se ne okazus la azia sportkunveno antaŭ tri monatoj, ni povus rompi mondan rekordon en la konkurso.

Raportisto de la Inform-agentejo Reuters: En la lastaj du jaroj Ĉinio havis impeton en naĝa sportbranĉo. Diru al mi, en kio do kuŝas la kaŭzo.

Chen Yunpeng: La impeto ne estas hazarda. Por tio ni preparis nin pli ol 10 jarojn. Fakte, ĉirkaŭ 1985 Ĉinio havis ian progreson en naĝa sportbranĉo. En la 60-aj jaroj pro diversaj kaŭzoj ni ĉesis esti membro de la Internacia Naĝ-amatora Federacio, ke dum 22 jaroj ni havis nenian kontaktiĝon kun internaciaj naĝistaj rondoj. Poste, estis restarigita nia leĝa pozicio en la federacio kaj ni multe laboris por plioftigi kontaktiĝon kun aliaj landoj. Ekzemple, ni kvarfoje trejnigis nin en Aŭstralio kaj konkursis aŭ trejniĝis en Kanado, Usono, Japanio kaj Nederlando. Samtempe kun tio, ni invitis alilandajn fakulojn por trejni niajn naĝistojn. En 1986 ni invitis faman trejniston Klaus Rudolf de GDR al Ĉinio, kaj li trejnigis ĉinajn naĝistojn ok monatojn. Ĉio ĉi metis solidan bazon por la ĉinaj naĝistoj en lerno de alilandaj spertoj.

Raportisto de la Aŭstralia Asociita Inform-agentejo: Ĉu la trejnisto de GDR instruis al ĉinaj



Lin Li gajnis la ĉampionecon de la 400-metra virina mikснаĝo en la Sesa Monda Ĉampioneeca Konkurso de Naĝo.



Zhuang Yong gajnis la ĉampionecon de la 100-metra virina libera naĝo en la Sesa Monda Ĉampioneeca Konkurso de Naĝo.

naĝistoj ingesti stimulilon antaŭ konkurso?

Chen Yunpeng: Ĉu via demando aludas, ke nepre devas uzi stimulilon tiu, kiu akiras helpon de germano kaj progresas en naĝa sportbranĉo?

Liu Ji: La Olimpika Komitato de Ĉinio ĉiam rigore sin tenas kontraŭ stimulo. Ni severe malpermesas ingesti stimulilon, rigore ekzamenas ĉiun sportiston kaj severe punas stimulo-ingestinton. Kun tiuj reguloj ne eblas por ĉinaj sportistoj ingesti stimulilon.

Raportisto de la Au/stralia Asociita Inform-agentejo: Nun iuj trejnistoj proponas drogeksamenon. Kian sintenon Ĉinio tenas pri tio?

Chen Yunpeng: Ĉiujare, antaŭ konkurso de naĝo en Ĉinio, oni faras rigoran drogeksamenon al ĉiuj naĝistoj. La Ĉina Centro por Stimulila Ekzameno estas organizaĵo agnoskita de la Internacia Olimpika Komitato. Ĉinio akiris rimarkindan progreson de naĝa sportbranĉo ne nur en la lastaj du jaroj. Jam en la 60-aj jaroj Ĉinio rompis mondan rekordon de naĝo kaj okupis lokojn antaŭ la deka de la mondo en papilia naĝo, brusta naĝo kaj libera naĝo. Verdire, nia progreso rezultis de la kombino de nova kaj malnova sperto de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Raportisto de la Inform-agentejo Reuters: Antaŭ nelonge, trejnistoj de naĝo de iuj landoj asertis, ke en la lastaj du jaroj ĉinaj teamoj akiris rimarkindan sukceson en iuj sportbranĉoj dank' al stimulo. Kiel opinias pri tio la ĉinaj teamoj?

Liu Ji: Ni tre bedaŭras pro tia senkaŭza suspekto de tiuj uloj. Ni tre ĝojas pro progreso de ĉiu ajn lando en

naĝa sportbranĉo kaj esperas, ke la sportistoj de ĉiuj landoj akiras bonan sukceson.

Raportisto de Ĉinio: Ĉu la senkaŭza suspekto negative influis la ĉinajn naĝistojn?

Chen Yunpeng: Neniom. Mi prenu ekzemplon. Fama usona sportistino de mallong-distanca kuro Florence Griffith Joyner akiris bonan sukceson en la 24-aj Olimpikoj de Seulo. En la lastaj jaroj ŝi estis plurfoje riproĉita, ke ŝi ingestis stimulilon. Sportistoj, kia ŝi, estis riproĉitaj senkaŭze, por ne paroli pri ĉinaj naĝistoj.

Raportisto de la Inform-agentejo Reuters: Kiel vi povas atesti, ke ĉinaj naĝistoj neniam ingestis stimulilon?

Liu Ji: Ĉiuj sportistoj, kiuj partoprenis en la 11-a Azia Sportkunveno, kaj ĉiuj naĝistoj, kiuj partoprenis en tiu ĉi konkurso, estis senescepte ekzamenitaj pri stimulo. Kompreneble, ili ĉiuj trapasis la ekzamenon.

Raportisto de la Asociita Inform-agentejo de Usono: Kial f-ino Huang Xiaomin ne bone ludis en la konkurso?

Chen Yunpeng: Ŝi komencis prepari sin malfrue por la konkurso post la azia sportkunveno. Antaŭ la konkurso ŝi febris pro malvarmumo kaj eĉ en la tago antaŭ ol ni forlasis Pekinon por alveni Perth, ŝi devis akcepti injekton. Tial, ŝi forlasis la rajton partopreni en la konkurso de 200-metra brusto-naĝo. En la konkurso de 100-metra brusta naĝo ŝi ne akiris bonan sukceson pro manko de forto. Tamen, mi kredas, ke en la 25-aj Olimpikoj de Barcelono vi vidos, ke ŝi bone ludos kiel en la 24-aj. ■

KOLOROJ DE LA PEKINAJ LOĜDOMOJ

En Ĉinio ĉiu urbo havas sian trajton. Se juĝate sole laŭ koloro, Pekino estas malhele griza. Precipe en vintro, posttagmeze la ĉielo estas griza, la tero griza, la antikva urbo ŝajne tuta estas en grizo profunda kaj mistera. Se ni vojaĝas de Kantono al Pekino trapasante Ŝanhajon, ni rimarkas la ŝanĝigon de koloro: helflava, helbruna kaj malhele griza. Kantono estas riĉa je sunlumo, tie la konstruoj plejparte estas helflavaj aŭ blankaj, kiuj aspektas brile en la fono de verdaj arboj kaj ruĝaj floroj. Pro tio ja ne estas mirinde, ke viglaj estas la kantonanoj. La konstruoj en Ŝanhajo ĝenerale estas helbrunaj kaj terflavaj. En la fono de afiŝaj tabuloj, ili aspektas kaj kviete kaj brue. Jen kial estas graciaj kaj ĝentilaj la ŝanhajanoj. En Pekino preskaŭ ĉiuj konstruoj estas grizaj, escepte de la imperiestraj domoj kaj aristokrataj loĝejoj. Ĝuste pro tio estas simplaj kaj malkaŝemaj la pekinanoj.

Kial tie la konstruaĵoj plejparte estas grizaj? En norda Ĉinio estas forta la sablovento kaj la konstruoj facile malpurigas, tial ili estas malhele kolorigitaj. Sed la pli grava kialo kuŝas en tio, ke Pekino estis imperia ĉefurbo. Por elstarigi la majestecon de la imperiestraj loĝejoj la civitanaj loĝdomoj estis rigore limigitaj kaj en la formo kaj la alto, eĉ la pordoj ne estis faritaj meze de la muro. Sole la imperiestraj domoj estis flavaj, dum la civitanaj loĝejoj estis malaltaj kaj grizaj, kio pli majestigis la imperiestrajn domojn.

Kun tempopaso okazis metamorfozo en la arkitekturo. En la lastaj jaroj modernaj loĝkvartaloj aperis unu post alia en la proksima antaŭurbo de Pekino, krom tio vidiĝis ankaŭ blankaj muroj de loĝdomoj, kiuj rompis la grizan monotonecon en la urbo.

“INFORMEJO-TETRINKEJO” EN FUZHOU

Entreprenistoj, kiuj antaŭe kutimis akiri informojn el komputiloj, ĵurnaloj kaj televidilo, nun trovis en Fuzhou alian informojon — tetrinkejon.

La tetrinkejo sidas ĉe Taijiang-foirejo en la urbo Fuzhou. Ĝi estas unu el la dek grandaj foirejoj de Ĉinio. Ĝi estas ankaŭ la plej granda vendloko de agrikulturaj, flankokupaj kaj lokaj produktaĵoj en Fujian-provinco. La loko estas brua, movoplana, tamen la “informejo-tetrinkejo” silente servas al la klientoj. Senĝene trinkante teon, oni akiris novajn informojn pri la foiro, produktado, liverado kaj vendado de la varoj.

Posttagmeze de iu semajnofino de decembro 1990, la tetrinkejo okazigis la dekan informkunvenon. En la antikveca konstruo brilis belaj palacaj lanternoj, afable servis kelneroj en bluaj vestoj. Ĉio ĉi impresis kiel antikva tetrinkejo. Post anonco de la Prezo-informa Centro de Fujian-provinco fabrikestroj, di-

rektoroj kaj knabinoj de publikaj interrilatoj unu post alia iris sur la podion por publikigi siajn informojn kaj peti kunlaboron.

En malgranda eksponejo malantaŭ la tetrinkejo estis diversaj varoj.

De marto 1990, kiam oficiale komenciĝis servado de la “informejo-tetrinkejo”, oni ĉiumonate okazigis kunvenon por publikigi informojn pri varoj, kiun partoprenis centoj da homoj entute. Nekompleta statistiko montras, ke helpate de la tetrinkejo oni faris komercadon en valoro de pli ol 10 milionoj da juanoj. La “informejo-tetrinkejo” altiris multajn en- kaj eksterlandajn personojn, inkl. de fabrikestroj, direktoroj, perantoj kaj privataj komercistoj el nordorienta, nordokcidenta kaj sudokcidenta Ĉinio kaj Fujian-provinco. Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ vizitantoj el Japanio, Hongkongo kaj Taiwan-provinco.

PLEJ FRUA TROVO KAJ UZO DE NEGATIVAJ NOMBROJ

Jam en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.) ĉinoj posedis la koncepton pri negativaj nombroj kaj ilian uzadon. Per multaj metodoj oni prezentis la negativajn nombrojn, ekzemple, per la ruĝaj signoj oni prezentis la pozitivajn nombrojn kaj per la nigraj la negativajn.

En la unuaj jaroj post Kristo, en Ĉinio jam legiĝis en la libroj pozitivaj kaj negativaj nombroj kaj iliaj kalkulaj reguloj. En la ĉapitro “Ekvacio” de fama antikva aritmetika verko “Jiuzhang Suanshu”, oni donis klaran koncepton pri pozitivaj kaj negativaj nombroj kaj iliajn regulojn de adicio kaj subtraho. Tio estas la plej frua noto pri negativaj nombroj en la homa historio. La ekvacio prezentita de la verko “Jiuzhang Suanshu” estas la plej frua metodo de la homa historio, per kiu oni solvis lindearan ekvaciaron utiligante elementan ŝanĝigon de matrico. Estas montrinde ankaŭ, ke jam en la antikva Ĉinio oni komencis utiligi koncepton pri pozitivaj kaj negativaj nombroj kaj ilian kalkuladon por solvi diversajn realajn problemojn. Ekzemple, en la libro “Qianxiangli” verkita en la dua jarcento p.K. legiĝas astronomia kalkulado per pozitivaj kaj negativaj nombroj.

Kompreneble grava kontribuo al la homa civilizacio estas tio, ke Ĉinio la unua trovis la pozitivajn kaj negativajn nombrojn, klarigis kaj utiligis regulojn de ilia kalkulado, ĉar sen konceptoj pri pozitivaj kaj negativaj nombroj kaj ilia kalkulado, ne disvolviĝus la alta kaj moderna matematikoj, nek la elementa matematiko. En la tempo, kiam rapide disvolviĝas la sciencoj kaj teknikoj, la konceptoj pri pozitivaj kaj negativaj nombroj kaj ilia utiligo jam rompis la matematikan kampon kaj fariĝis fundamenta scio nemankigebla por la sciencoj kaj teknikoj. Ili jam profundigis en la ordinara homa vivo.

JULIUS BALBIN (Usono):

La Granda Muro

*La verda stelo fiere surgrimpas
la plej altan supron de la Granda Muro,
laŭ kiu serpentumas dumejllonga amaso
da mondlingvanoj, venintaj el la tuta mondo,
celebri en ĝojo, feliĉo kaj entuziasmo.*

*En la nevidebla lontano
malantaŭ la murego
ankoraŭ galopas imaginaraj mongoloj
sur siaj etaj ĉevaloj, kies hufoj
sublevas nubojn da sableroj.
La sabloza aero de Pekino
strangolas nin per astmo —
nin, la pacajn batalantojn,
alvenintajn ĉi-tie
el la kvin anguloj de l' mondo
por partopreni la ĉiujaran
lingvojamboreon
de interkompreniĝo kaj malmilito.*

*Kaj jen ni ĉiuj alsuprenis tiun
Grandan Muron, la solan homkreitan
objekton, kiun la astronautoj
kapablis vidi el la luno
trans la senfina ekstera spaco.*

*Kaj nun, trans la spaco de jarcentoj,
mi ekvidas la galopantajn mongolojn,
tiujn senkomparajn rajdantojn
kaj arkpafistojn, provantajn invadi
la pacamajn loĝantojn de Hanlando.
Kaj mi povas konstati kiel iliaj
fortoj frakasigas kontraŭ
la fortikaĵoj de tiu unika
Granda Muro.*

*Dum ni parolas kaj kantas
ridas kaj fotas, tuta Pekino
ŝajnas ekrajdi sur bicikloj.
La loĝantoj de ĉi tiu
grandioza urbo, tiel riĉa
je palacoj, temploj, muzeoj
kaj maŭzoleoj ŝajnas esti
same kunkreskintaj kun
siaj bicikloj, kiel la
mongoloj kun siaj ĉevaloj.
Ili biciklas kaj biciklas
senĉese, kvazaŭ ili dezirus
forbicikli for de sia urbo
al iu pli bona, pli bela
kaj pli justa metropolo
de l' imaginara estonteco.*

1986




EKONOMIO

- La Ŝanhaja Jiangnan-a Ŝipfarejo unufoje konstruis grandan ŝipon por likvigita petrolgaso. La ŝipo, 89.6 m longa kaj 14.6 m larĝa, havas kapaciton de 3 000 kubmetroj. Nun nur kelkaj landoj povas fari tian ŝipon.

- En Turpan-baseno oriente de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono oni trovis lastatempe olekampon kun areo de 48 000 kvadrataj kilometroj. La olekampo distancas de fervojo nur je 7 km, ĝia oletavolo estas malprofunde kaŝita kaj la nafto estas bonkvalita, kio faciligas ekspluatadon. La Petrola kaj Naturgasa Kompanio de Ĉinio sendis 14 000 laboristojn al la baseno por ekspluati la olekampon.

- En la Yangbajan-a Tervarma Elektrejo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono estas lanĉitaj du



La Yangbajan-a Tervarma Elektrejo de Tibeto

aliaj generatoroj, kiuj jam produktas elektron. Nun finkonstruiĝis la elektrejo kun totala generatora kapacito de 25 000 kW, kiu produktas la plej grandan kvanton da tervarma elektro en Ĉinio, havas plej multe da generatoroj kaj estas la plej alta super la marnivelo. Krome, ankaŭ sunenergia elektrejo, projektita kaj konstruita de Ĉinio mem, finkonstruiĝis en Ge'gya-gubernio de Tibeto. Ĝi, kun povo de 10 088 vattoj, estas la plej alta en la mondo. Konstrui tian elektrejon estas unu el la gravaj rimedoj por provizi landlimajn regionojn, insulojn kaj paŝtejojn per elektro.

- En 1990, la produktokvanto de tritiko de Ĉinio superis 100 miliardojn da kg kaj okupis la unuan lokon en la mondo. La hektara produktokvanto estis 3 270 kg, je 40% pli multe ol tiu de la mondo.

- Tekniko termopremi materialon de kemia industrio en ŝtofon kaj ekspluati ĝiajn produktaĵojn kreiĝis antaŭ nelonge en Ĉinio. Fakuloj opinias, ke tio markas, ke la tekniko de senteksa ŝtofo de Ĉinio atingis la mondan nivelon.

La tekniko rapide disvolviĝis eksterlande en la lastaj jaroj, sed ĝi komencis aplikiĝi antaŭ nelonge en Ĉinio. La laborefikeco kreskis centoble kompare kun tiu de la tradicia teksado.

- La 110 specialaj ŝarĝvagonoj produktitaj de Ĉinio por Bocvano transportiĝis februaire al ĉi tiu lando. Estis la unua fojo por Ĉinio vendi vagonojn al afrika lando, post kiam ĝi venkis 11 alilandajn kompaniojn en internacia adjudiko kaj en majo 1990 kontraktis kun la Bocvana Fervoja Buroo pri vendo de 284 ŝarĝvagonoj en valoro de 12 milionoj da usonaj dolaroj.

- Jam ekfunkciis la 415.2-metra disaŭdiga kaj televida turo de Tianjin. En la turo estas ĉambroj por radioelsendo kaj televido, mikroondaj aparatoj kaj transformatoroj. En ĝi estas ankaŭ pluruza gva-tejo kaj turniĝanta restoracio.



La disaŭdiga kaj televida turo de Tianjin

- Laŭ la statistiko de la Ŝtata Buroo por Alilandaj Specialistoj, en la pasintaj dek jaroj Ĉinio dungis sume 180 000 alilandajn specialistojn, sesoble pli multe ol en la 30 jaroj antaŭ ol ekpraktikiĝis la reformo kaj pordmalfermo en 1978. Ili el 50 landoj kaj regionoj laboras en 30 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de Ĉinio kaj kontribuas al ĝia socialisma konstruado.

KULTURO

● Konfuceo (551-479 a.K.) estis fama antikva ĉina pensulo, edukisto kaj fondinto de konfuceanismo. La ĉinaj akademiaj rondoj, krom tradiciaj problemoj de konfuceanismo, studas ankaŭ la pensojn de Konfuceo pri ekonomio, juro, moralo, milita afero, talento kaj muziko, kaj liajn teoriojn pri medicino kaj matematiko, kaj ili pli multe atentis la studon pri valoro de liaj pensoj en la ĉina socio.

● "Tradukoj de Diversdinastiaj Famaj Verkoj de Ĉinio" (en serio) estas eldonataj de la Popola Eldonejo de Guizhou-provinco.

La enhavoriĉaj antikvaj verkoj pri la ĉina kulturo estas skribitaj en klasikaj lingvoj. Por faciligi legadon la eldonejo organizis multajn fakulojn por fari elekton kaj traduki ilin en la modernan lingvon. La serio konsistas el 25 milionoj da ideogramoj. La fakuloj turnis grandan atenton ne nur sur popularecon de glosoj kaj tradukoj, sed ankaŭ sur akademian kaj referencan valoron, tiel ke la serio pli utilas por studi kaj konservi.

● En la Unua Foiro de Delikataj Metiartoj, okazinta en Ŝanhajo antaŭ nelonge, eburaj mikroskulptaĵo altiris nemalmultajn rigardantojn. Ĉe la unua rigardo ĝi ŝajnas ordinara: Kadre de palisandra framo ĝi havas en la supra parto araneaĵon el 17 eburaj fadenoj maldikaj kiel haro. Al la elpendanta fadeno al kroĉiĝas ludanta araneo. Rigardante ĝin per lupeo, oni povas vidi sur la araneaĵo la liberstile gravuritan tekston el 6 972 ideogramoj de la kvina ĉapitro de la fama klasika ĉina verko "Songo en Ruĝa Buduaro". Pli mirinde estas, ke la figuroj de 12 virinoj en la verko gravuriĝas sur la dorso kaj kruroj de araneo granda kiel maizo.

● Ĉinio eksportis al pli ol 30 landoj kaj regionoj ĉ. mil novajn filmojn kaj 500 televidfilmojn en la pasintaj tri jaroj. Inter ili 61 filmoj gajnis 72 premiojn en internaciaj filmaj projekcioj aŭ konkursoj.

SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

● El la 8 urĝe solvendaj malfacilaj problemoj en la mondo prezentitaj de la Monda Futura Asocio 5 estas solvitaj de ĉinaj sciencistoj. Ekzemple, hidroĵona brulaĵo malaltpreza, fontoabunda, sekura

kaj nepolucianta; cigaredo, facile efikdona, nevenena, maniolibera kaj kuracefika por fumantoj; porvira kontraŭgravedigilo, nevenena kaj senflankefika (se oni uzas ĝin por unu horo, la kontraŭgravediga efiko daŭros minimume unu monaton); ĉiudirekta ŝtelimuna memdefenda alarmilo (instalite en aŭto, ĝi povas alarmi kontraŭ ĉiu ajn ŝtelo).

HIGIENO

● La malseka terapio por brulvundo, kreita de Ĉinio, estas pli kaj pli atentata de la internaciaj medicinaj rondoj. Nun 20 landoj esperas enkonduki la terapion.

En 1989 fondiĝis la Ĉina Scienc-teknika Centro por Brulvundo. En la pasintaj du jaroj 3 000 hospitaloj partoprenis en urĝsavo. Ĉiujare 150 000 pacientoj resaniĝis. 89.75% de la pacientoj kun vundareo de pli ol 40% (plej alte 98%) resaniĝis post kuraco.

● La plej granda ĉina kuracista trupo el 668 membroj veturis al 43 landoj kaj regionoj en la komenco de la kuranta jaro.

● La Internacia Naturmedicina Asocio difinis la Xinjiang-an Ujguran Aŭtonoman Regionon de Ĉinio kiel la kvaran regionon de longvivuloj, kun la motivo, ke el la 3 765 ĉinaj longvivuloj super la aĝo de 100 jaroj 856 vivas en Xinjiang. Fakuloj konstatis post esploro, ke la grenoj de la regiono entenas mikroelementojn utilajn al longviveco de homo. La aliaj tri regionoj de longvivuloj estas Hunza-regiono de Pakistano, Gruzio de Sovetunio kaj Ekvadoro de Sud-Ameriko.

Xie Jun (dekstre), ĉina ŝakludistino, venkis sian jugoslavan rivalon Alisa Maric en la konkurso por gajni la kandidatecon por la ĉampiono de la Monda Virina Ŝakkonkurso.



Humuraĵoj

Sur strato iris miopulo. Subite ventego forblovis lian nigran ĉapelon. Li do postkuris la ĉapelon. Je la momento virino kriis al li:

“He, kion vi volas, sinjoro?”

“Mi postkuras mian ĉapelon,” li respondis anhele.

“Sed vi postkuras mian nigran kokinin!”



* * *

“Sinjoro, ĉu vi aŭdis mian kanton en la hieraŭa vespero, kiu plenigis la tutan halon?”

“Jes, mi vidis, ke multaj aŭskultantoj foriris, ke via kanto plenu ankaŭ la sidlokojn.”

* * *

“Viktoro, kial vi denove portas sunokulvitrojn hodiaŭ?”

“Ĉar nia instruisto juĝas laŭ la okuloj, kiu ne bone sin preparis al la leciono,” mallaŭte respondis Viktoro.

Ĉinaj proverboj pri sanigo

Sobra en manĝo,
Senhasta en irado,

Pacienca en afero,
Profunda en dormo.


Matenmanĝo sata,
Tagmanĝo nutroza,
Vespermanĝo simpla
— vivo longa.

Ne restu malviglaj la maljunuloj,
la korpon ekzercu senĉese.
Manĝu ĉiam sobre,
bonan humoron tenu firme.

Dieto vegetara,
Promenado persista,
laborintenso modera,
humoro facila.

* * *

Misvido (Karikatur)



Novaj rakontoj pri lupo

I

Lupo, kiu atakis ŝafaron, estis mordvundita de hundo. Ĝi falis kaj ne povis iri serĉi manĝaĵon. Ĝi volis trinki akvon de proksima rivereto, sed ne povis sin movi.

En tiu momento venis ŝafido de malproksime. La lupo petis la ŝafidon senforte: "Fraĉjo mia, mi tre soifas. Bonvolu tuj preni por mi iom da akvo!"

La ŝafido rigardis la lupon kaj diris kapskue: "Mi ne povas servi al vi."

"Hm!" apenaŭ ekkoleris la lupo, ĝi tuj sin detenis, ĉar subite ekdoloregis ĝia vundo. "Mi grave vundiĝis kaj ne povas moviĝi. Ĉu vi ne kompatas min?"

La ŝafido skuis la kapon refoje.


La lupo petegis kun larmoj en la okuloj: "Helpu min, fraĉjo mia! Se vi donos al mi iom da akvo, mi ricevos forton por stariĝi kaj serĉi manĝaĵon. Se ne, mi mortos de malsato kaj soifo."

"Se mi donus al vi akvon, vi povus stariĝi kaj kruele formanĝi min," la ŝafido rifuzis kaj foriris.

II

Lupo kaj vulpo jam ĵuris, ke ili ĉiam estos bonaj amikoj kaj helpos unu la alian en malfacilo.

Iun tagon la lupo falis en riveron kaj kriis helpon.



Aŭdinte la krion, la vulpo tuj alkuris.

"Tuj savu min, mia bona amiko!"

"Kompreneble ni estas bonaj amikoj. Sed per kio vi rekompencos min por la savo?"

Tion aŭdinte, la lupo tre koleris, sed havis neniun rimedon krom promesi: "Hieraŭ vespere mi ŝtelis unu ŝafon, formanĝis duonon kaj konservis la alian duonon en la hejmo. Mi donacos al vi la ceteran, se vi savos min."

"Bonege! Sed mi perdis la forton pro malsato kaj ne povas savi vin. Mi unue devas manĝi la ŝafajon en via hejmo por reakiri la forton kaj poste revenos savi vin," la vulpo diris kaj foriris.

"Kio! Vi estas eĉ tia 'amiko'!" kolere kriis la lupo.

La vulpo returnis la kapon kaj ridis: "Ha, ha! Ĉu vi forgesis, ke mi estas vulpo? Post via falo en la riveron mi ne jetis ŝtonon sur vian kapon. Tio jam pravas, ke mi estas via bona amiko!" ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj au/ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Mi aĉetas internaciajn respondkuponojn. Sendu vian oferton al mi. Hobby Samleren, P.O.Box 1099, N-5001 Bergen, Norway.

* Jonas Attila, 16-j. knabo, dez. kor. tm. pri diversaj temoj, kolektas kaj interŝ. bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn el Ĉinio, Japanio, Francio kaj aliaj landoj. Adr.: Aleea Transilvaniei 5/56, Baia

Mare 4800 Maramures, Rumanio.

* Aurelija Liesyte, 15-j. knabino, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Laukininku 40-64, 235822 Klaipeda, Litovio, Sovetunio.

* Eva Navratilova, 15-j. studentino, dez. kor. kun samaĝuloj, interesiĝas pri sporto kaj literaturo. Adr.: Odry-742 35, V.I. Lenina 10, Ĉeĥoslovakio.

* Imre Veronika Maria, 18-j. knabino, dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: Str. Cinepii nr 49, Loc. Sighisoara, jud Mures, cod 3050, Rumanio.

* Eugeno Nikolskij, 14-j. knabo, dez. kor. tm., kolektas poŝtmar-

kojn. Adr.: Krasnojarsk, Akademgorodok, 7-78, Siberio SU-660036, USSR.

* Savic Verica, 17-j. lernantino, dez. kor. kun esperantistoj tutmonde pri pm, bk. Esperante, angle kaj ruse. Adr.: Ustanicka 152, 11000 Beogrado, Jugoslavio.

* Deziras labori Eŭrope. Ramon Martinez, Cia Sao Geraldo, Rodoviaria, 35.300-Caratinga-MG, Brazilo.

* Deziras interŝanĝi nur filatelajojn pri Esperanto (pm-jn, poŝtampojn, utk-jn, ktp.) kun kolektantoj de la tm. Sebastiao Pereira, Caixa Postal, 1752, 50001 Recife/Pe, Brazilo.




En la tetrinkejo

Tetrinkejo Lao She

Teksto de CAO WEI
Fotoj de CAI HAIFENG

Kant-rakontado

Servistinoj de la tetrinkejo






Klientoj

GENERALE dirite, en Pekino oni ŝatas viziti la Imperiestran Palacon, Beihai-parkon, la Grandan Muron kaj la Someran Palacon. Ŝajnas, ke oni ne speras la pekinan guston, se ili ne vizitis la antikvecan tetrinkejon, ne ĝuis pekinan operon kaj kant-rakonton en pekina dialekto kun akompano de tambureto.

Pro diversaj kaŭzoj pekinaj tetrinkejoj malaperis antaŭ multaj jaroj, kaj refunkcias nur en la lastaj

La 90-jara Sun Baocai prezentas en la tetrinkejo.



jaroj. El ili la plej fama estas la tetrinkejo Lao She. Ĝi sidas okcidente de Qianmen-turo en la komerca kvartalo de Pekino. Ĝi estas establita memore al Lao She, fama ĉina verkisto, kiu iam verkis la dramon "Tetrinkejo". En la dramo Lao She priskribis la socian ŝanĝigon de la malnova Ĉinio, kiam tetrinkejo estis distrejo ne sole de riĉuloj, ĝiaj klientoj plejparte estis plebanoj. Oni vizitis tetrinkejon por laboro kaj komercado. Tie oni ankaŭ intervidiĝis kun amikoj. Tial tetrinkejo funkciis ankaŭ kiel loko de komunikigo. Tie oni povis ĝui prezentadon de popularaj artistoj, pro tio tetrinkejo servis kiel distrejo de malriĉuloj, kiuj ne havis monon por viziti teatron.

La tetrinkejo Lao She havas freŝan enhavon krom la malnovaj trajtoj. Ĉe la enirejo vidiĝas statuo de s-ro Lao She kun afabla mieno. Malfermite la gravuritan lignan pordon, oni tuj eniras en la antikvecan medion: gagatnigraj tabloj kaj seĝoj bonorde staras meze de la hela halo; en ĝia suda parto troviĝas bufedoj kun etmanĝaĵoj de pekina gusto, teo de Maojian, Longjing k.a.; tra la brilaj fenestroj en ĝia norda flanko oni vidas Qianmen-turon kaj homfluojn; en ĝia okcidento estas malgranda scenejo videbla de ĉiuj anguloj de la halo, sur la viola kurteno pendas portreto de s-ro Lao She. Ĉio ĉi faris la medion kvieta kaj eleganta.

Nun ĝiaj klientoj ĉefe estas turistoj ĉinaj kaj alilandaj, malnovaj loĝantoj de Pekino, kiuj sopiras al la tradicia vivo de la urbo kaj junaj geamantoj. La turistoj vizitas tetrinkejon por sperti la tradician vivon de pekinanoj. En iliaj okuloj tio impresas, kiel en la pasinteco ĉinaj ĝentiluloj en robo libere paŝadis. Iu juna kliento diris: "Mi venis en Pekinon pro ofico. Fininte mian taskon, mi tiom lacis, ke mi ne povis viziti la Imperiestran Palacon kaj Beihai-parkon. Informiĝinte pri la tetrinkejo Lao She, mi deziris min refreŝigi ĉi tie. Kiel atendite, la ĉi tiea atmosfero tre plaĉas al mi, kvankam mi ne bone komprenas la ludon nun faratan."

Sed al la maljunaj pekinanoj plaĉis ne nur la tiea atmosfero, sed ankaŭ la delikata gusto. Mi renkontis tri emeritojn, kiuj parolis pri malnovaj aferoj, taktante per piedo laŭ la ritmo de pekina opero, manĝante melonsemojn kaj trinkante freŝan teon. Kiam mi petis ilian impreson pri la tetrinkejo, unu el ili diris al mi: "Antaŭ kelkdek jaroj tetrinkejoj vidiĝis preskaŭ ĉie en Pekino, ekz. ĉe Hademen-pordego, Tambura Turo kaj Qianmen-pordego. Tiam mi ofte vizitis ilin en libera tempo. Tie mi prenis melonsemojn kaj trinkis tason da teo. La tiamaj tetrinkejoj estis simplaj, ne tiel luksaj kiel la nunaj kaj malofte estis spektaklo, sed tiam oni pagis malmulte tie. La nunaj tetrinkejoj estas luksaj kaj samtempe multekostaj. Per mia pensio mi povas viziti ĝin nur malofte. Tamen, tetrinkejo ja estas distrejo por ni maljunaj pekinanoj." Vere, viziti tetrinkejon estas iom multekoste por ni, ordinaraj salajruloj. Kompren-

ble ankaŭ ĝia funkciiganto estas klara pri tio, kaj okazigas aktivadon por amantoj de pekina opero ĉiudimanche en mateno, tial oni ĝuas rabaton por viziti tetrinkejon. Tiam la vizitantoj povas kanti pekinan operon sur scenejo akompanate de *jinghuo* (ĉina korda instrumento). Tion oni humure nomas pekin-opera karaoke.

Krom la supre menciitaj, la tetrinkejon frekventas ankaŭ junaj geamantoj. Fakte al ili ne tiel plaĉas la tetrinkejo. En malagraba vetero ili iras tien, sidiĝas en angulo kaj ĝuante teon kaj kukojn, verŝas koron unu al la alia. Ankaŭ tio estas vera ĝuo!

Ĝenerale, viglas sur la scenejo de la tetrinkejo ĉinaj tradiciaj artoj, kiaj pekina opero, kant-rakonto en pekina dialekto kun akompano de tambureto kaj humura dialogo. La klientoj jen kaj jen aplaŭdas pro la bela prezentado. Ŝajnas, ke oni denove spertas la vivon de malnovaj pekinanoj antaŭ kelkdek jaroj.

Kiam vi forlasas la tetrinkejon kaj denove iras sur la movoplena strato, vi trovas, ke la vivo progresas. Returninte la rigardon al la tetrinkejo, vi rimarkas, ke la tetrinkejo kaj la usona krakmanĝejo de Kentucky troviĝas en la sama domo. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	11.50	18.50	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	USD	7.80	12.50	17.50

Ĝardena korto de ujguroj

Teksto de ZHANG MEIZHI

Fotoj de LIU SIGONG

LA lastan aŭtunon mi vizitis Yining de Xinjiang, kie loĝas ĉefe ujuguroj. Foje, mi perdis la vojon kaj paŝis en strateton.

Mi sencele iris antaŭen en la strateto kaj la atento estis subite altirita de eksterordinaraj fenestroj ambaŭflanke de ĝi. La fenestroj estis kovritaj per ligna tabulo kun transversa ferstango kiel riglilo. La framoj estis delikate skulptitaj.

Kun scivolemo mi malfermis pordon kaj eniris la korton.

Ho, kiel bela korto! Diversaj floroj, arboj kaj dense ombranta vinbera pergolo ornamis la korton. Inter la verdaĵoj kuŝis longa vico da lignaj domoj sur alta bazamento. Antaŭ la domo estis larĝa portiko kun ligna planko. Ĉu la balustrado, ĉu la kolonoj, ĉu la rando de la tegmento, ĉio estis bele gravurita. La fenestroj havas duoblan klapon, t.e., vitran kaj lignan. La tuta

konstruaĵo havis kolorojn bluan kaj verdan kiel la ĉefajn.

Kvieteco regis en la korto. Ujgura virino estis mamnutranta bebon sub la vinbera pergolo. Ĉe la vido de mia alveno, ŝi leviĝis por min saluti kaj kriis al la ĉambro. Ŝi estis najbarino de la mastrino. La mastrino estis 40-jareca ujugurino. Same kiel aliaj ujuguraj virinoj, ŝi havis multkoloran kufon sur la kapo, sed ŝiaj vestoj estis preskaŭ samaj kiel tiuj de han-naciaj viri-

En korto







Loĝdomoj en nacia stilo



Pordornamo



Du-etaĝa loĝdomo



Infanoj

En ĉambro ornamita
per murtapiŝoj



noj. Ŝi diris, ke ankaŭ ŝi havas silkan jupon ŝatatan de ujuguraj virinoj, sed ŝi ne portas ĝin. Ŝi bone parolas han-lingvon. Pri sia loĝejo ŝi diris, ke en la lastaj jaroj multaj urbanoj de Yining konstruis novajn domojn unu- aŭ duetaĝajn, kaj ĉiuj domoj estas pli belaj ol la ŝia.

Ŝi diris la veron. Antaŭ multe da jaroj Yining, grava pasejo sur la antikva Silka Vojo, estis urbo loĝata de riĉaj komercistoj, kiuj konstruis por si belajn domojn. La arkitekturo herediĝas generacio post generacio. Ŝajne, ĝi estis influita de la arkitekturo de la okcidenta Azio, tiu de Rusio aŭ de islamismo. Ĝenerale, la domoj brikaĵaj kaj lignaj rigardas al vasta korto kun larĝa portiko. La gravuraĵoj sur la pordoj kaj fenestroj frapas la okulojn. En la lastaj jaroj iuj urbanoj riĉiĝis pro komercado kaj konstruis por si novajn domojn. La strukturo kaj stilo restis samaj kiel kutime, sed la deko estis pli luksa.

La domo de Wupur Aji estas la plej elstara en la urbo. La lignaj pomarboj sur la alero rememorigas pri fabela palaco. La 43-jara Wupur Aji montris al mi la turtan neston kaj diris humure, ke laŭ diro de ujuguroj, kiu havas turtan neston en sia domo, tiu estas obeema al sia edzino. Tiam lia edzino estis preparanta vespermanĝon por la edzo. Ŝi diris kun rido: "Sed fakte, mi devas flegi la infanojn kaj prepari manĝon." La forno kaj kuiriloj estis tre puraj, kio pruvis ŝian laboremon. La diketa mastrino diris al mi, ke kutime ujuguraj virinoj zorgas pri manĝopreparo kaj preparas manĝon laŭ plaĉo de sia edzo. Somere ili faras tion en la korto kaj vintre en la kelo.

Mi vidis, ke ŝia infano manĝas farunaĵon nomatan *nang-o*. Mi demandis, ĉu ŝi mem faris ĝin. *Nang-o* estas plej kutima manĝaĵo de ujuguroj, tre simila al fermentinta flano en norda Ĉinio, sed la farado estas pli komplika. Troviĝas vendejoj de *nang-o*, sed la urbanoj ŝatas mem fari ĝin. En ŝia korto estas bakujo por *nang-o*. Ĝi estas



Somera kuirejo ekster domo


neniom diferenca de ordinaraj fornoj, sed interne de la bakujo estas dika tavolo da argilo. Oni gluas pastojn al la parieto de la bakujo por ilin baki. La ĵus bakita *nang-o* estas tre bongusta. Sed preskaŭ ĉiu *nang-o* surhavas iom da argilo, tial oni ŝerce diras, ke ujuguroj englutas multan argilon en la jaro.

La mastro enlasis min en la ĉambron. Li diris, ke kutime ujuguroj ne malfermas fenestrojn rigardantajn al strato por teni sekurecon kaj purecon. Li ŝaltis la lustron kaj mi vidis luksan salonon. Veluro kovris la fenestrojn, la pordo, fenestroj kaj kornico de la plafono ĉiuj estis ornamitaj per delikataj skulptaĵoj. La funda muro estis ornamita per tapiŝo kun grandaj floraĵoj. Sub la tapiŝo estis kanapoj kaj tetabloj. La tuta ĉambro impresis per pureco.

Ĉe la pordo al la postaj ĉambroj estis ŝranko kun servicoj por manĝo kaj teo. Post la salono estis tri ĉambroj, kaj unu el ili estis gasteĉambro. En la vasta gasteĉambro milde lumis lampo. La malhelruĝaj tapiŝoj sur la planko kaj muro

sentigis kvietecon kaj komfortecon. Ĉirkaŭite de la milda koloro, mi sidis sur la dika tapiŝo kaj aŭskultis kanton de la mastro. Sed bedaŭrinde tiam mi dronis en dormo kaj nun ne povas rememori, kiel estas meblita la ĉambro.

La ĉambro por la gemastroj troviĝis flanke de la domo. Ankaŭ la ĉambro estis ornamita per murtapiŝo, sed meblita multe malpli lukse. Min profunde impresis la granda kapkuseno. La kusentego, farita de la mastrino, surhavis helkolorajn brodaĵojn. Preskaŭ en ĉiuj hejmoj, kiujn mi vizitis, mi vidis tiajn kapkusenojn. La ujuguraj virinoj estas tre lertaj en brodado. Mi ofte vidis brodantajn ujugurinojn en larĝa portiko. La desegnoj de la tegoj estas freŝkoloraj. Iafoje mi vidis, ke ili kudras lulante sian bebon. La lullito longas 1 metron kaj larĝas duonmetron. La arkaj piedoj de la lito faciligas ĝian balancadon. Multaj el la ujuguraj virinoj ŝatas kudradi kaj luli samtempe. Ili metas sian bebon en la lito kaj rimene ligas ĝiajn membrojn. Kudrante ili piedbatetas la lito, ke la



Sub pergolo

En portiko

bebo rapide endormiĝu.

La ujuguroj estas gastamaj kaj puremaj. Antaŭ manĝo ili nepre petas la gastojn lavi la manojn. Preskaŭ ĉiuj familioj en Yining havas kruĉon kaj pelvon ekskluzive por manlavo. La kruĉo, kun longa kaj maldika kolo kaj granda ventro, estas farita el argilo aŭ kupro. La mastro tenas la kruĉon je la kolo, verŝas akvon sur la manojn de gasto kaj la eluzita akvo falas en la pelvon. La pelvo estas malprofunda kaj havas larĝan randon. La kruĉo kaj pelvo surhavas ĉizitajn desegnojn. Mi aŭdis, ke tia kruĉo estas manfarita.

Post manlavo li prezentas al la gasto laktajojn, bombonojn, frititajn farunaĵojn kaj fruktojn. Ujuguroj manĝas fruktojn anstataŭ trinki akvon, tial mi neniam trinkis akvon en mia gastado ĉe ujuguroj. La frandado kaj konversacio havas lokon en la portiko, en la korto aŭ sub la vinbera pergolo. Ifoje mastroj kantas mem en akompano de muzikilo, dum junulinoj dancas laŭ la takto. Gajeco ravas ĉiujn ĉeestantojn. ■



Tradicia festo de li-oj

Teksto kaj fotoj de MAO JIANJUN



Fajrokulta danco


La tria de la tria monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas tradicia festo de li-oj de Hainan-provinco. Tiutage la li-oj de ĉiuj vilaĝoj kantas kaj dancas en belaj vestoj.

Cirkulas bela legendo pri la festo. Ĝi diras, ke en pratempo inundo englutis la teron. En la loko vivis nur frato kaj fratino. Brakuminte kalabason, ili naĝis en la inundo. Kiam ili venis al Yanwo-montaro ĉe Changhua-rivero de Hainan, ili estis malhelpitaj de granda arbo kaj tiel saviĝis. Kiam malaperis la inundo, ili decidis disiĝi por serĉi siajn familianojn kaj interkonsentis, ke ili renkontiĝos en la montaro la trian de la tria monato ĉiujare. Ili serĉadis en ĉiuj lokoj kaj trovis neniun el siaj familianoj. Jaro jaron sekvis kaj ili ne estis tiom junaj. La fratino tatuis sian vizaĝon, por ke ŝia frato ne povu rekoni ŝin. La trian de la tria monato de la sekva jaro ili geedziĝis en la montaro kaj naskis gefilojn. La gefiloj generis, kaj tiel multiĝis la li-oj.

Nun la li-oj de Hainan ankoraŭ vivas ĉe Changhua-rivero kaj en Wuzhi-montaro. Kiel kutime, ili kantas kaj dancas en la festo por rememorigi pri siaj prapatroj.

Dancado en la festo





Junuloj en prezentado





Knabinoj festvestitaj

Knabinoj kun arbofolio en la mano



JINAN-A PETROLRAFINEJO

sub la Ĉina Petrol-kemia Kompanio



Ĝi estas granda fabriko moderne ekipita, produktanta diversajn bonkvalitajn produktaĵojn el petrolo.

La ĉefaj produktaĵoj de la fabriko estas gasolino, keroseno, dizeloleo, solvilo n-ro 200, lubrikoleo, bitumo, asfalto, kaŭĉuka pleniga oleo, parafino, likvigita gaso k.a. Krome la fabriko produktas ankaŭ alumetan parafinon, turbinan oleon, altklasan aŭtomobilan oleon, plastigilon kaj lubrikoleojn de alta kaj meza klasoj de diversaj normoj.

La petrolrafinejo volonte servas al la tuta mondo. Bonvolu kontaktiĝi per letero aŭ telegramo.

Adreso: Str. Gongyenanlu, Jinan, Shandong, Ĉinio

Telefono: 47330/47339

Telegramo: 8350